

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Albana proverbo: La satulo ne komprenas la malsatulon

Nr 56 Decembro 2004

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio
Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758
(Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)

Rete: pistolia@yahoo.com , apistoli@aol.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); motto@bwc.org (Martha Otto) ; fiorialbtours@yahoo.com (Fjoralba Sadiku); asokoli@bkursimeve.com.al Nehat Sokoli; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com ; egli_b@wp.pl (Egli Brati) ; eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi); agimperaj@yahoo.it ; tcobani@yahoo.com (Tonin Çobani)

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

Rimarkigo: Kial albanaj esperantistoj insiste rifuzas uzi la liston 'albanaj-esperantistoj'?

Gratulojn al Bardhyl kaj al c'iu, kiuj labori por aperigi la novan lernolibron por abanoj! Kunlige kun tio mi s'atas demandi vin, ke iu klarigu al mi, kial albanaj esperantistoj neniam uzas la liston <albanaj-esperantistoj@yahoogroups.com>, kiu povus esti ilo por kunmeti kaj igi la albanajn esperantistojn kunlabori. Devas esti iu kialo, sed mi ne kompenas g'in. Amike **Renato**

Renato Corsetti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina, Italujo
<renato.corsetti@virgilio.it>

ENHAVO
Studado

Magistrig'oj
Anoncoj de Internacia Studumo
Interlingvistiko
Novaj kursoj
Tirana blindulejo
Tutnacia Hotelumada Mezlernejo
Fremdlingva Mezlernejo
Gimnazioj
Nova lernolibro
Aperis nova lernolibro
Propagando
Informaj'oj de Henri Masson
Esperanto en verkoj de Ismail Kadare
Eventoj regionaj
Balkanlanda Konferenco
Novaj'oj el Bydgoszcz
Aliaj novaj'oj
Intervjuo
Ismail Kadare respondas al "Voc'o de Ameriko"
El la diplomlaboraj'oj de niaj gestudentoj
Fragmento de diplomlaboraj'o de Elton Zaimi

La bakalaurino Fioralba rajtas magistrig[^]i lau lamalnovaj kondic[^]oj (g[^]is 2006). Tio signifas, ke s[^]i bezonas minimume 80 rezultajn studunuojn, inter ili almenaŭ 3 de SUS - inter tiuj unu de la propra sesio, unu el alia sesio, unu kun noto - kaj unu kroma de AIS-sesio kun noto. Pri s[^]i mi havas informon pri neniu studunuoj krom la 40 por la bakalaurig[^]o, sed eble mankas al mi informoj pri s[^]iaj SUS-kursoj, do mi petas ke s[^]i sendu al mi kopiojn de s[^]iaj SUS-atestoj.
Afable salutes

Dieter Quednau

Karaj bakalaurinoj Sokoli kaj Cena,

Mi tre g[^]ojas pro via decido magistrig[^]i ĉe AIS kaj komenci labori pri la magistra tezo. Kvankam en AIS ekzistas multegaj studentoj pri turismiko, bedaŭrinde malabundas la docentoj pri tiu fako - do estas malfacile trovi taŭgan patronon. Por ke mi povu helpi en la serĉado de patrono, bv. komuniki, pri kiu(j) temo(j) vi interesig[^]as. Krome mi petas: I.) Se vi havas atestojn de SUS (ekz. SUS 24 en Bydgoszcz), bv. sendi al mi kopiojn, por ke mi povu jam prepari viajn ekzamendosierojn. II.) Bv. komuniki al mi, kie vi planas akiri la ankoraŭ mankantajn studunuojn (mi supozas, ke vi ne pli studas en Bydgoszcz) Elkore salutas **Dieter Quednau**

SINANONCO AL STUDADO ĈE AIS

STUDIEN-ANMELDUNG BEI DER AIS

Mi petas pri enmatrlikulo ĉe AIS

Ich bitte um Immatrikulation bei der AIS

kun la studadcelo:
mit dem Studienziel: BAK. MAG. DR. DR.HAB.

en la sekcio
in der Sektion
 KIB HUM STRUKT FIL NAT MORF

Familia nomo:

Individua(j) nomo(j):

Naskiĝdato:

Naskiĝloko (kun landokodo):

Maturec-ekzameno:

jaro:

loko:

Jam kompletigita studado:

grado:

fako:

jaro:

altlernejo:

Mi aldonas poste sendos
certigitan kopion de mia
 maturecekzameno studfina atesto

Mi indikas dorsflanke miajn poŝt- kaj retadresojn

Auf der Rückseite gebe ich meine Post- und Netz-Adresse an

Mi asertas la ĝustecon de miaj indikoj

Ich versichere die Richtigkeit meiner Angaben

Mi scias, ke enmatrikuligo bazita sur malveraj indikoj estos nuligata de AIS

Mir ist bekannt, dass eine auf falschen Angaben beruhende Immatrikulation von der AIS zurückgenommen wird.

....., **200**...-.....-.....

Loko/Ort
Unterschrift

dato/Datum

Subskribo /

.....
Rimarkoj de la klerigofico:

La studento estas provizore/definitive akceptita

kaj ricevis la matrikulan numeron:

kun eldondato kaj eldonloko:

.....
.....
Subskribo / Unterschrift

Specialigxo pri lingvopedagogio enkadre de la Interlingvistikaj Studoj

Post la bazaj studoj pri gxenerala kaj aplikata lingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado, planlingvistiko, esperantaj kulturo, gramatiko, literaturo kaj movadhistorio, la 3a jaro de Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznan, Pollando) estas cxifoje dedixita al lingvopedagogio enkadre de la specialigxo. La auxuna sesio de la kvina semestro okazis inter la 25.09-01.10.2004 kun la kontribuo de Istvan Ertl kiu donis vastan bildon pri la nuntempa e-literaturo. La gestudentoj povis konatigxi kun la teorio de lingvoinstruado kaj praktike spertigxi pri esperanta metodiko dank'al la dinamikaj lecionoj de la voja gxanta metodikistino, d-rino Katalin Kovats kaj al la krakova metodikistino Maria Majerczak, estrino de la Pola ILEI-sekcio. Kiel tradicie, la sesion sekvis la ricxa jubilea programo de la 20a Arkones en Poznan, el kiuj eblas mencii nur kelkajn. Okazis prelegoj pri europa lingvopolitiko (I. Ertl), esperantlingva bildo de la mondo (I. Koutny), esperanto en la postmodernismo (W. Zelazny), postvivo de Poznana Proklamo (Z. Galor), pri la jxus mortinta Nobel-premiito Milosz (L. Ligeza) kaj la antaux 100 jaroj naskigxinta Nobel-premiito Singer (T. Chmielik). Teatrajxoj (junularaj teatroj Instigo kaj Spontanea) kaj koncertoj (Suzanna Kornicka, Georgo Handzlik, kantoj de Moliere Ngangu) plenigis la sabatan vesperon. Prezintis sin la junulara grupo, diversaj eldonejoj kaj abundis diskutoj lauxprogramaj (e.g. pri e-literaturo) kaj eksterprogramaj. Plurfoje aperis rememoro pri Tadeusz Chrobak, la jxus mortinta organizanto de Arkones. **Dr Ilona Koutny, membro de AdE, gvidanto de Interlingvistikaj Studoj Universitato Adam Mickiewicz Miedzochodka 5, PL-60-371 Poznan T: +48-61 829-27-09, sekretariejo: 829-27-01 F: +48-61 829-27-00 (sekretariejo) <http://main.amu.edu.pl/~interl/index.html>**

STUDADO 2005/2006

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO EN BYDGOSZCZ

KLERIGEJO DE LA INTERNACIA AKADEMIO DE LA SCIENCOJ

STR.M.SKŁODOWSKIEJ-CURIE 10, PL 85-094 BYDGOSZCZ – POLLANDO

tel./fax: (48-52) 346-11-51 e-mail: stud@esperanto-turismo.com, www.esperanto-turismo.com

NI INVITAS AL STUDADO DE TURISMO, KULTURO KAJ LINGVOJ en 2005/2006

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo estas trijara nepublika post-maturecekzamena lernejo funkcia ekde 1991, laulegxe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 51/99). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS, Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Akademio de Bydgoszcz, Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de

Instruistoj, Vojevodio Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkono Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo „Kujavio kaj Pomerelio”, Pola Esperanto-Asocio kaj vojaĝoficejo „Flugo”.

En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan san-staton. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en nau profesioj (simboloj de Europa Unio):

post la 1-a studjaro — akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj arangxoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (422104), oficisto en vojaĝagentejo (422103) kaj internacia vojaĝgvidanto (511301);

post la 2-a studjaro — kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta keramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado (341401), regiona turisma ĉiĉerono (511304) kaj animanto de kultura agado (347601);

post la 3-a studjaro — profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto (235910), specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo (241915) kaj specialisto pri organizado de kulturo (241990); ev. titolo de bakalaŭro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj.

Lau dekreto de la pola Ministro pri Edukado de la 1-a de aŭgusto 2000 j., kiu estis publikigita en la sxtata legx-ĵurnalo — fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto. Cxiutage oni instruas en Esperanto.

En la studjaro 2005/2006 kadre de la Studumo oni planas kunlabore kun Vojaĝoficejo „Flugo” gvidadon de specialigitaj kursoj pri turismo, kulturo kaj bizneso kaj ankaŭ konversaciaj lingvokursoj. Cxiuj kursoj kostas semajne 10 eŭrojn au 10 USD.

Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branĉoj de scienco — i.a. pri turismiko, ekologio, eŭrologio, etnologio, etnografio, kultur- kaj soci-geografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, komerco, merkatico, estrado kaj pluraj lingvoj.

La studjaro 2005/2006 daŭros ekde septembro 2005 ĝis majo 2006 kaj ampleksos: laŭ ĉiutaga sistemo po 30-40 studhoroj semajne (ferioj decembre kaj januare), kaj laŭ t.n. eksterĉeesta sistemo — tri stud-ekzamenajn sesiojn: fine de septembro 2005, januare/februare 2006 kaj aprile/maje 2006. Necesas partopreni almenaŭ finekzamensesion aprile/maje 2005. Eksterĉeestaj gestudentoj povas ankaŭ partopreni, sen krompago, libere elektiblajn kursojn ekster la sesioj.

La studado cxe ISTK/AKB en la studjaro 2005/2006 komencigxos per Internacia Sesio de Pola AIS-Societo dum 5-24 de septembro 2005 jaro en Lublin. La organizantoj de la Sesio estas Pola AIS-Societo, Teknika Universitato en Lublin kaj Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, kiu akceptas aligxojn kaj kotizojn — 200 Eŭroj au 200 USD por trisemajna logxado en studentaj domoj de Teknika Universitato en Lublin kaj programo de la Sesio (5-24.09.2005) i.a. kun lernado de Esperanto kaj de pola lingvo por eksterlandanoj kaj ev. BUS-6 de AIS.

En Bydgoszcz la studjaro 2005/2006 komencigxos dum la 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kaj dum la 28-a Sesio de AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB) de la 25 septembro — 2 oktobro 2005, okaze de la Monda Tago de Turismo.

Dum la jaroj 1991–2004 lecionojn en la Studumo gvidis lekciistoj el 50 landoj de Europo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Australio por gestudentoj el 65 landoj de la mondo. La plej ofte uzataj lingvoj en la Studumo, apud la pola kaj Esperanto, estis: angla, hispana, franca, litova, albana, itala, mongola, germana kaj rusa. La gestudentoj konatigxis tiel pri kulturo kaj lingvoj de diversaj nacioj, kaj fremdlandanoj ankaŭ pri la polaj. La studadprogramojn eblas legi en: www.esperanto-turismo.com.

La studkotizoj por la studjaro 2005/2006 estas samaj por ambau sistemoj — **200 USD** au **200 eŭroj** (ĝxis la fino de decembro 2004), poste 250 USD au 250 eŭroj. Kaze de enpago kaj neeblo alveni la kandidato povas prokrasti la studentigxon ĝxis la sekva studjaro (t.e. 2006/2007), studentigi anstataŭe alian personon el la sama au alia lando, au — se eblas — utiligi la pagon por internaciaj vojaĝoj de la Internacia Klubo „Esperantotur”; resendo de la mono ne eblas.

Aligxojn akceptas la sekretariejo de la studumo (adreso komence); la studkotizojn oni pagu al bankkonto:

Bank Pocztowy SA O/Bydgoszcz

Konto n-ro **80 13201117 2034 0100 2000 0001**

Miedzynarodowe Centrum Kultury i Turystyki, SWIFT kodo: **POCZPLP4**.

Grave: sen stud-pago ne eblas ricevi invitleteron, se la aligxinto ĝxin bezonas por akiri polan vizon; krom tio konsideru, ke ekde septembro estas tre malfacile arangxi vizon por la kuranta studjaro — tial indas aligxi kaj pagi frue, prefere ĝxis aŭgusto.

La viv-kostoj en Bydgoszcz (logxado+mangxado) estas ekde US\$ 100 au 100 eŭroj ĉiumonate — kaj tiujn oni povas pagadi surloke.

Gestudentoj de la studumo povas ankaŭ studentigxi ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj (krom-kosto 32,50 €), kio rajtigas al 80% rabato de kromaj kurset- kaj ekzamen-kotizoj de AIS en Bydgoszcz au aliloke en centra/orienta Europo — kaj al ĉiuj finstudintoj permesas akiri la titolon de bakalaŭro, kaj post pliaj du stud-jaroj ankaŭ magistro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj. Bonvenon al nia internacia studumo kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz(AKB)!

ALIĜILO

por Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo 2005/2006

aŭ

por kursoj dum en ISTK 2005/2006

FAMILINOMO:

Nomoj:

Naskiĝdato kaj loko:

Plena poŝta adreso:

.....

Tel./ fakso/ e-mail:

Finita lernejo:

Dato:

Subskribo:

Libroj**Aperis nova lernolibro**

Kiel anoncite en la 55-a numero, je 26an de oktobro aperis nova lernolibro de Esperanto por albanoj, verkita de s-ro Bardhyl Selimi. G'i enhavas entute 150 pag'oj kaj kostas 500 L (5 euroj). Krom 20 lecionoj de la kurso, la libro havas minimuman selektitan vortaron kaj plurajn ilustraj'ojn. G'i malfermig'as per enkonduko pri historio de Esperanto en Albanio. Tia eldonaj'o estas tre necesa kaj aktuala c'ar la du lernolibroj verkitaj antaŭ dek jaroj, respektive de s-roj Vasil Pistoli kaj Zef Mjeda, jam elc'erpig'is kaj ne reeldonig'is plu.

Shaban Hasani**Datenbazo pri Esperanto kaj Turismo**

Ferii kaj paroli esperante dumvojugxe, jen la deziro de cxiuj esperantistoj. Tial "Havra Esperantista Grupo" prilaboras la eldonadon de reta gvidlibro "Turismo kaj Esperanto" en kiu aperos cxiuj lokoj (hoteloj, kampadejoj, feriejoj, komercejoj, muzeoj, bibliotekoj, pregxejoj, monumentoj, turismoficejoj, TTT-ejoj, ktp ...) kie Esperanto estas parolata, aux kie informoj estas legeblaj en Esperanto. Post ricevo de la permeso de Nacia Komisiono "Informadiko kaj Liberecoj", tiu gvidilo estos rete legebla de tutmondaj esperantistoj. Ni alvokas cxiujn por helpo. Bonvolu komuniki al ni informojn, Por ebligi sendon de multaj posxtajtoj, posxtmarkoj kaj internaciaj respondkuponoj estos bonvenaj. Ni esperas esti pretaj venontan printempon. Bonvolu printigi tiun pagxon kaj diskonigi kiel eble plej multe.

Perletere :

S-ro Bernard DUFRESNE
14, rue de Saint-Aignan

**76600 LE HAVRE
FRANCE**

Rete : <http://esperanto-lehavre.org>

En la nomo de Havra Esperantista Grupo,
La Prezidantino : **Sylvie CARON**

Letero de samideanino Martha

Saluton kaj shalom!

Karaj,

Mi pardonpetas pro ege malfrua respondo al viaj mesaghoj kaj sendajhoj. Mi presis la bultenon (koregan dankon!) kaj gratulas vin je via senlaca kaj fruktodona laboro, precipe ke vi verkis novan lernolibron kombinante la plej taugajn partojn de aliaj libroj kun viaj lingvosperteco kaj kapabloj. Chu ghi jam estas achetebla? Kiam mi revenos Albanien mi certe shatas havi kaj uzi ghin. Dezirante inkludi bonan novajhon pri mia E-o ektiveco chi-tie, mi prokrastis mian respondon, sed bedaurinde ghi ne estas tiel brila. Mi ofertis E-o informvesperon, sed venis nur unu japana amikino. Tamen la echo estis sufiche pozitiva - nur - la amikoj chi-tie estas tiom okupitaj (inclusive mi) kun diversaj kursoj, volontulado, festoj kaj aranghoj (krom nia 44-hora semajno), ke estas malfacile trovi liberajn vesperojn. Dufoje monate mi rekontighas la lokajn/regionajn Esperantistojn en la urbo, kie ni havas viglajn interparoladon kaj diskutojn. Mi ege ghuas hebrean kurson kun izraela instruisitino, kvankam la lingvo estas sufiche malmoderna kaj komplika - la tuta malo de Esperanto! La laboro en la biblioteko estas tre agrabla, ni ankau ricevis materialojn de la UK kaj la Nitobe simpozio. Al vi, viaj familianoj (kaj via laboro) mi deziras chion bonan, dauran progreson kaj ghojn. Ghis venontfoje mi kore salutes vin,
Martha

Lernokursoj

Tirana blindulejo

Ekde 26° de oktobro 2004 sekvas la kurson jenaj gelernantoj:

Plarentina Dervishi; Denisa Onjezi; Ada Hajrullahi; Drenica Masha; Klodiana Minja; Saimir Rrahmani; Blerian Prado, Qazim Kumria; Ilir Gjyli; Andi Cani; Festim Stafa; Spartak Xharri
Entute 12

Tutnacia Hotelumada Mezlernejo

Ekde 15° de novembro 2004 sekvas la lernokurson jenaj gestudentoj:

Kreshnik Llubani; Marenglen Neli; Besmir Shllaku; Xhemil Gjana; Bulent Mullai; Ana Jaupaj; Evaldo Dervishi; Edri Çabiri; Altin Qefalia; Artion Kurti; Florian Rexhepi; Armand Allushi; Eris Shani; Julian Sejati; Ilir Helmësi; Elona Hamaj; Gerald Shehu; Arsen Nuro; Besmir Banushi; Gentian Dema; Tonin Prenga; Marius Note; Lorena Duka; Marsida Shehi; Migena Memaidini; Elgin Xhafa; Erildo Albrahimi; Kladiola Velaj; Armand Kurdalia; Emalvino Canku; Gjergji Shtembari; Luljeta Koldashi; Oriana

Bardhi; Jonian Kokona; JolaRrapaj; Altin Pelinxhi; Eriola Tufa; Genti Lako; Albert Kuqari.
Entute 40

Privata hotelumada mezlernejo HOTURS

Ekde 20° de oktobro sekvas lernokurosn jenaj gestudentoj:
Ilza Ishmaku; Aleando Jaku; Fatjon Gjoka; Gerald Demiri; Arion Isufi; Roland Sakja;
Dhospina Progonati.
Entute 7

Fremdlingva mezlernejo “Asim Vokshi”

Rosela Spahia; Eleda Hallvaxhiu; Doris Hekali (klasa III-F)
Entute 3

Okjarlernejanoj
Entute 2

Raportis **Matilda Sokoli**

Propagando

Esperanto en verkoj de Ismail Kadare

Je la fino de oktobro , prof. Bashkim Kuçuku , c'efo de katedro de la Albana Lingvo c'e Filologia Fakultato en Tirane anoncis ke baldau' aperos lia libro pri la tradukaj'oj de la verkoj de Ismail Kadare fremdlingve. Lau' li, Ismail Kadare estas la plej konata albana verkisto eksterlande danke al la tradukoj de siaj verkoj en fremdlingvoj. C'i kaze li aldonas al la listo de fremdlingvoj uzataj por la verkoj de konata verkisto ankaŭ Esperanton. Fakte g'is nun estas tradukitaj nur kelkaj mallongaj rakontoj, unu romano (temas pri “La Generalon de la Mortinta Armeo” enesperantigita de s-ro Vasil Pistoli, ankoraŭ ne eldonita) kaj fragmentoj el la studoj de Kadare pri Eskilo kaj pri la rolo de beletro por la homaro, publikigitaj en la Bultenoj de nia Instituto kaj sur pag'oj de la revuo La Gazeto.

Rita Permeti

Faik Konica pri la Angla

Lastatempe mi trovis en biblioteko du trezorajn librojn de nia eminentulo antaŭ la Dua Mondmilito Faik Konica. Li ambasadoris en Usono sed paralele verkis multe kaj publikigis artikolojn pri la albana vivo. Jen artikoleto aperinta en la jaro 1897 sur la revuo ALBANIA eldonita en Bruselo.

Pri la Angla

“Albania”, 30° de julio 1897

Hodiaŭ oni rimarkas c'ie ke la Angla farig'as c'iam pli grava. En Eu'ropo la gefiloj de grandaj ric'aj familioj konsideras honoro lerni en la anglaj lernejoj; aliflanke en la lernejoj de Francio, Germanio, Belgio, Nederlando kaj alilande la lernado de la angla estas ja devo.

Tion kau'zas unuavice la beleco de tiu lingvo. Envere la angla estas unu el la plej belaj enmonde, ne komprabla al kelkiu alia lingvo, la genieco de au'toroj kiel S'ekspiro, Miltono, Pope, Bajrono, Shelley, Tebyson estas entuziasmiginta milionojn da kleraj

homoj kaj artistoj. Je la komenco de XIX jarcento la poezio akiris novan impeton en Francio, kaj ties c'efuloj estis Lamartino kaj Hugoo kiuj estis nutrig'intaj mense per ka kanzonoj de S'ekspiro kaj Bajrono. Krom la belecon, la angla havas alian grandan utilon. La statistikoj montras ke la angla parolatas de pli ol tricent milionoj da homoj kaj tiu nombro c'iam pli kreskas.

Kie ajn ni iras, en c'iu urbo au' vilag'o de Eu'ropo ekzistas homo scipovanta la anglan. Krom Anglujon, la angla parolatas en norda Ameriko, en Hindujo kaj aliaj teritorioj. Plue, g'i ne estas malfacila en la lernado. Kontrau'e, okulfrapas g'ia facileco. Kiu ajn konanta filologion bone scias ke post la persa lingvo la angla estas la lingvo kun plej simpligita kaj purigita gramatiko disde la dornoj.

Por konkludi, en la angla estas tro da mirindaj'oj!- tie ja estas vortoj kiel en la albana. Ekz. oni diras I am (same kiel en la albana Une jam- Mi estas), oni diras door por derepordo; oni diras you por ju-vi, kc.

Kompreneble Faik Konica glorigas la anglan sed gravas ke tion lid diris pli ol cent jarojn antau'e, kiam ankoraŭ la franca dominantis!

Bardhyl Selimi

La 6-a Balkanlanda Esperanto-Konferenco (BEK) Amikeca kunestado de Balkananoj

De la 13-a gxis la 15-a de auxgusto 2004 okazis en la urbo NIsx (Serbio) la 6-a Blkanlanda Esperanto-Konferenco. Organizanto estis Esperanto-societo "C'ele Kula", Nis'. Cxeestis, laux mia pritakso, pli ol 150 personoj.

El aliaj Balkanaj landoj partoprenis jenaj E-reprezentantoj:

Bulgario: -S-ro Prof. Bojxidar Leonov, Prezidanto de "AIS-Bulagario" kaj Rektoro de Internacia Universitato – Karlovo;

El Makedonio: S-ro Stojan Kocevski, prezidanto de Makedonia Esperanto-

Ligo, Skopje, kun pluraj junaj esperantistoj

El Respubliko Serba, Bosnio k Hercegovino: S-ro Mic'o Vrhovac, Prezidanto de Esperanto-Ligo de Respubliko Serba; membro de la urba ES "La Monrdo", Banja Luka; Bedauxrinde, forestis esperantistoj el aliaj Balkanaj landoj.

El Kroatio cxeestis nur parte unu persono, private.

Menciindas ke konsiderinda nombro de esperantistoj el Rumanio antauxanoncis sian alvenon, sed, pro iaj kialoj ili ne povis ekveturi.

La solena malfermo okazis la 13/08/04 posttagmeze. Estis ludata la esperantista himno, kaj salutparolis pluraj partoprenantoj.

S-ro Z'ivko Ivanovic' el la urbo Jagodina donacis al la organizanto 5 ekzemplerojn de Antologio de la serba poezio, kies tradukinto, redaktinto kaj eldoninto li mem estas.

S-ro Boris'a Milic'evic' el Novi Sad donacis al la organizanto, nome de Esperanto-societo "Marko Nes'ic' " 5 ekzempelojn de la poemareto "Poeziaj donacoj".

La etoso estis vere amikeca. Vespere okazis, kiel kutime, Interkona vespero, kun belega distro.

S-ro Rektoro Boj'idar Leonov kolektantis subtensubskribojn sur la Deklaraci-papero por establo de Esperanto-instruado cxe la Internacia Universitato, Karlovo. Neniu el la petataj personoj ne rifuzis subskribi.

La 14-an de aŭgusto antaŭtagmeze okazis rimarkinda kunveno de literaturistoj kaj literaturemuloj, tradukistoj/antoj kaj instruistoj/antoj.

La kunvenon gvidis Boris'a Milic'evic', direktoro de Esperanto-Instituto de SEL. Li koncize prezentis kronologian eldonandon de en-Esperantaj antologioj en Balkanaj landoj. La rezulto estas rimarkinda.

Poste, li informis la cxeestantojn pri sia manuskripto "El Balkana Moderna Poezio, La XX-a jarcento" proponante ke oni kune eldonu gxin. La manuskripto enhavas po du poetojn el cxiu Balkana lando.

Kelkaj partoprenantoj diskutis kaj subtenis aperigon de la manuskripto kaj same aliaj cxeestantoj.

Posttagmeze s-ro Momčilo-Moma Krstic' parolis pri la 89-a UK en Pekino ilustrante sian prelegon per diversaj prezentajxoj.

Dum la sama posttagmezo okazis "B"-ekzameno de Esperanto, laux la Regularo de Esperanto-Instituto de SEL. La kandidato estis la junulo Marko Nikolic', lernanto de la finita II-a klaso de gimnazio, el Nis'. Li montris vere bonegan scion kaj ricevis la noton "Bonega (5). Oni solene enmanigis al li "B"-atestilon kaj 1 poemaron premie.

Tiu tago finigxis per bonetosa vespero kun loterio.

Dum la tria labortago oni pritraktis la Konferenclaboron kaj proponis jenajn aferojn kiel konkludojn de la Konferenco (pro mia foresto, s-ro Mic'o Vrhovac helpis min en koncizigo de cxi tiuj proponoj/konkludoj:

-Subteno por aperigo de la poemaro "El Balkana Moderna Poezio";

-Establo de diversspeca kunlaboroj inter esperantistoj kaj E-organizajxoj de Balkanaj landoj (intersxangco de vizitoj, libroj, E-turistoj, pli intensa kunlaboro inter E-Ligoj kaj -societoj de Balkanaj landoj);

-La sekva konferenco-kongreso okazos en Karlovo, Bulgario en junio 2005.

Informas **Boris'a Milic'evic'**

TAMEN raporto

De 7a g'is la 10a de oktobro 2004 en Teslic', Banja Vruc'ica, Respubliko Srpska, BkH, okazis TAMEN (Teslic'a Alvoko Movig'i al Eŭropa Nacieco). Seminarion organizis Esperanto-Societo "Teslic'" subtenante de IKV (nederlanda pacmovada organizaj'o) kaj EEU.

Seminarion c'eestis 34 homoj el balkanaj landoj (Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino, Serbio kaj Montenegro, Makedonio). Prelegantoj estis el Slovenio, Nederlando, Bosnio kaj Hercegovino. Dum prelegoj oni pritraktis stato de neEU landoj kaj ilia vojo al Eŭropa Unio. Multe da demandoj stari'is, homoj tre interese diskutis pri estonteco de sia lando en EU. Konkludante la seminarion oni havis kunsidon kie partoprenantoj esprimis iliaj opiniojn pri la seminario kaj kelkaj punktoj elstaras. C'iuuj tenas ke TAMEN estis tre interesa, aparte por la homoj el Bosnio kaj Hercegovino, c'ar unuan fojojn ili intere kunvenis kaj priparolis ilian specialan staton. Ankau', partoprenantoj estis plejparte junaj homoj (< 25 j.) kiuj, dum c'i tiu seminario, unuan fojon pripensis kelkajn demandojn pri EU kaj tio estas tre utila flanko de TAMEN.

Parolante pri estonteco de TAMEN, multaj trovis interese organizi sekvontan TAMEN, sed la ideo malantaŭ TAMEN estas ke g'in oni organizu en alia urbo de alia grupo de esperantistoj. Do, oni provis trovi alian interesig'antan grupon de esperantistoj pretaj fari

similan seminarion. Interesaj estas Makedonianoj c'ar ili bedau'ras malaktivan staton en sia landa movado, sed estonteco kaj financoj montros c'u io okazos.

Plua informo: www.esperanto.rs.ba/tamen

Igor MILOVANOVIC'

TAMEN organiza teamo

Bravo la Bretagne ! -- Pri mia reago al la gazeto "LE TELEGRAMME"

Senkulpigu min tiuj, kiuj ne scipovas la francan.

En tiu reago al la gazeto "Le Télégramme" aperanta en Bretonio (iom malpli ol 200 000 ekz.), kiun mi redaktis sekve de la sendo fare de Marko, mi respondis chefe, tamen post komplimentoj kaj rimarkoj pri bonaj iniciatoj chirkau E en Bretonio (Brave, Bretonio !) pri du tiklaj punktoj :

1. Esperanto kiel entute inventita lingvo (faite de toutes pièces). Fakte mi klarigas, ke chiuj "pecoj" de Esperanto fontas el ekzistantaj lingvoj
2. "adeptoj" de Esperanto. Al tio mi respondas ke ne taugas la vorto "adeptoj" por montri la parolantojn de Esperanto. Esperanto ne estas kredo sed klopodo logika, racia, justa, unuvorte : demokrata. **Henri Masson**

Bydgoszcz - urbo ĉe eŭropa rivero.

Enkonduko al albumo pri la urbo ... Kio estas tio? Kia devus esti tia enkonduka albuma teksto? Ĝi devas esti kiel vizitkarto. Kiel eleganta vizitkarto, kompreneble. Ne granda. Sur bona papero. Ne krianta kaj ne troiga. Kaj frunfaco kaj reverso. Minimumo da vortoj - maksimumo da informoj, neniaj plibeligoj, neniaj ornamaĵoj. Apenaŭ kelkaj necesaj vortoj per modesta kursiva, eventuale antikva stilo. Ĉu tio entute estas ebla?

Apenaŭ kelkaj frazoj pri Bydgoszcz! Kelkaj vortoj pri 400-mila, pulsanta urbo! Oka urbo en Pollando, je pli ol 650-jara historio! Pri Bydgoszcz kun nuntempaj eblecoj, dinamiko! Pri ĝiaj, kompreneble, de tiu Bydgoszcz, ambiciaj planoj por morgaŭ kaj postmorgaŭ! Pri ĝia beleco, etoso, lokoj la plej belaj, la plej gravaj, eble interesaj, eble nekonataj, eble romantikaj ...

Feliĉe albumo - tio antaŭ ĉio bildoj. Bildoj de la urbo pentritaj per sentemo de fotografikistoj, per lumo de tempoj, de tago kaj jaro, per ekspresio de kaptita strata trafiko, mastrumantaj loĝantoj, riĉeco de konstruaĵoj, stratoj, parkoj, fabrikoj, kulturaj kaj sportaj instancoj, gravaj eventoj kun amaso da trapasantoj, spektantoj, partoprenantoj, kibicantoj.

Kaj ĝuste tian albumon ni celis. Antaŭ ĉio, ke ĝi estu por tiuj, kiuj ankoraŭ ne estis en nia urbo, kiuj ne konas Bydgoszcz, sed ankaŭ ja, por ĝiaj loĝantoj. Por bydgoŝĉanoj de antaŭ longe kaj por tiuj de kelkaj jaroj, kaj por estintaj loĝantoj, ankaŭ por ili. Laŭ koncepto tiu nia albumo ne deziras esti altruda reklama printaĵo: *ĉe ni la plej bone, ĉe ni la plej bele, ĉe ni la plej malmultekoste, ĉe ni la plej abunde ...* Ĝi estas apenaŭ, aŭ tia revas esti, mozaika bildo de viva, granda, dinamika urba organismo. Per tiaj fotografaj pecetoj, kies apartaj elementoj - fotoj formas unu bildon - BYDGOSZCZ.

Ĉu estas iu aparta distingilo en la bildo de nia urbo, inter aliaj bildoj de aliaj grandaj eŭropaj urboj? Foliante tiun albumon pri Bydgoszcz atentu kiom da okupas en ĝi rivero. Kiom da estas en ĝi Brda. Jen, ĝuste. La rivero Brda kreis urbon Bydgoszcz. De historiaj komencoj la rivero Brda disvolvadis

Bydgoszcz, riĉigis ĝin, ankaŭ defendis ĝin, kaj antaŭ ĉio kunligis kun aliaj urboj, kun Eŭropo, kun la mondo.

Sed kiaj estis la komencoj?

En XI jarcento oni starigis setlejon, kiu gardis trapason trans la rivero, sed antaŭ ĉio gardis sekurecon de navigado. Tuj apud la setlejo arkeologoj antaŭ nelonge malkovris la unuan, ankoraŭ lignan, havenan kajon. Iomete pli poste (kion signifas 300 jaroj por historio) okcidenten de la setlejo, sed ankaŭ ĉe la rivero oni difinis starigi urbon. Urbajn rajtojn Bydgoszcz ricevis de la reĝo Kazimiro la Granda la 19-an de aprilo de 1346-a jaro. Kiel decas al solida mezepoka urbo baldaŭ estis ĉirkaŭita per urbaj muroj kun pordegoj, turoj kaj fosaĵo. Sed ne de la nordo. Tie sen iuj ajn bariloj ĝi tuŝis bordojn de Brda. La rivero asekuradis loĝantojn kontraŭ eventualaj atakantoj, kaj ĝia bordo estis natura haveno por multaj barkoj, boatoj, flosoj, lignoflosiloj ktp.

Ne estis do la plej digna loko por la plej grava konstruaĵo de la urbo, por ĝia sacrum, por paroka preĝejo, kiel bordo de la rivero. Kompreneble parokan preĝejon "Fara" oni starigis plej proksime al Brda, en pitoreska ĝia meandro, de kie same proksime al ĉefa placo de la urbo, nuntempa Malnova Foirplaco. Fara ekestis same kiel la urbo. De ĝia prospero, de ĝia disfloro. Kiam la komerco per greno, gudro, biero, potfaraĵoj kaj aliaj lokaj produktoj disvolviĝis la plej profite, riĉigante ankaŭ la ĉirkaŭan kujavian, palukian kaj krainan nobelaron, kiam urbo estis plej potenca, oni konstruis novan gotikan sanktejon, kaj ne senkaŭze unu el ĝiaj patronoj, S-ta Nikolao, estas ankaŭ patrono de navigistoj kaj de komercistoj.

La urbo rapide transpaŝis terenon signitan per urbaj muroj. Ekonomia sukceso funkciis kiel magneto. Ĝi favoris setligadon de la urbo. Kaj kiel vi opinias, kiel ja disvolviĝis space tiu nia Bydgoszcz dum XV, XVI, XVII jarcentoj? Ĉu koncentrite ĉirkaŭ la Malnova Foirplaco kaj Urbodomo? Tamen, ne. Sufiĉas kompari historian kaj nuntempan planojn de la urbo. Bydgoszcz disvolviĝis laŭlonge de Brda rivero, okcidenten kaj orienten direkte al alia grava por ni rivero, Vistulo. Sur ambaŭ bordoj de Brda oni konstruis grenmagazenojn kun komercaj kontoroj, magazenoj, havenoj, oni starigis ankaŭ monakejojn de karmelitanoj, klarisaninoj, bernardianoj. Masonitajn domojn oni konstruis iom profundece, ĉirkaŭ Foirplaco kaj laŭlonge de regule signitaj stratetoj de nuntempa Malnova Urbo. Sur rivera insulo, tuj apud ĉe Foirplaco kaj Fara funkciis tre specifa fabriko - Reĝa Monfarejo. En la XVI jarcento monfaraj instalaĵoj en tiel nomita "varko" estis movigataj per eĉ kvin akvaj radoj, peligataj per rivera kurento. Tie ĉi oni produktis malmultekostajn "boratinkojn" kaj famajn denarojn. Kiam en la XVIII jarcento la monfarejo ĉesis funkcii, anstataŭis ĝin Reĝaj Muelejoj, kreante nuntempan karakteron de la Mueleja Insulo.

Vere diversaj estis la sorto-vojoj de Bydgoszcz. Kiel en la vivo, post periodo de la sukceso, disfloro, venis periodo de stagnado, regreso, momente eĉ falo. Tiel estis post la sveda invado en la XVII jarcento, post la periodo de pestoj, okupadoj kaj destruciaj tramarŝoj de soldatoj en la XVIII jarcento. Kune kun perdo de sendependeco de la Respubliko - urbo Bydgoszcz ankaŭ falis en klopodojn. Preskaŭ malaperis. En la jaro 1772 la urbo transiris en la prusan okupadon por plenaj 148 jaroj.

Denove la urbo reviviĝis en la fino de XVIII kaj komenco de XIX jarcentoj. Favoris al tio novaj administraj solvoj, sed antaŭ ĉio, finkonstruado de Bydgoszcz-kanalo, kiu kun granda sukceso enskribiĝis en eŭropa sistemo de akvaj vojoj, funkcianta principe ĝis hodiaŭ. Kanalo malfermis novajn senlimajn eŭropajn ekonomiajn kontaktojn de Bydgoszcz kun: Berlino, Hamburgo, Antverpeno, tradicie kun Gdańsk kaj Toruń, kun Amsterdamo, ankaŭ kun Skandinavio, kaj tuta Eŭropo. Tiuj eksterordinaraj por tiuj tempoj inĝenieraj solvoj, ĝis hodiaŭ fascinas tiujn, kiuj observas malfermantajn sin akvajn pordegojn, reguligantajn akvan nivelon, kun ĉiu foje alia, mirinda, teknika sistemo.

Kio estis pli poste? Freneza, impeta XIX jarcento, kaj antaŭ ĉio, ĝia dua duono. En tiu tempo kuraĝe oni povas konstati, ke preskaŭ tuta Bydgoszcz estis konstruita denove. Kaj vere tuj je tre serioza skalo. Bona situo rilate, antaŭ ĉio, al akvaj itineroj, sed ankaŭ de la duono de XIX jarcento al fervojaj kaj

vojaj itineroj, favoris dinamikan evoluon de Bydgoszcz. Kiel fungoj post la pluvo aperis en la urbo grandaj fabrikoj, amasmagazenoj, riveraj havenoj. Preskaŭ ĉiuj el tiuj entreprenoj aperis je plej proksima najbareco de la rivero, ĉe ambaŭ ĝiaj bordoj. Daŭre ege grava restis kontakto kun plej grava transeŭropa trafika arterio kaj ĝia parto, kiu estis rivero Brda. Tiu peziga, moderna, brua vaporindustrio ne instigis por ekloĝadi apude. Ambaŭ bordoj de Brda, krom pli frue mastrita centro, fariĝis krudaj, malamikaj tiel, kiel respektinda, sed ne estetika admiro de panoramo kun fabrikaj haloj, kun kamenoj, tuboj, kun iuj deformitaj metalfolioj, kabloj, reloj. Jen, freneza vapor'jarcento. Tiun krudan impreson iom mildigis, pli multaj ol ie alie, lignaj barakoj de remistaj kluboj.

Sed jam ŝanĝiĝas. Denove la rivero komencas formi plej atrakcian urban panoramon. Tamen i.a. de tiuj ĉeriveraj XIX-jarcentaj fabrikoj, el la profitoj de ĝi, ekestis nova centro de Bydgoszcz. Malnova urbo maljuniĝis. Domoj evidentiĝis tro modestaj, malgrandaj kaj severaj. Sur norda bordo, de la monakejo de klarisaninoj laŭ malnova itinero al Gdańsk formiĝis moderna centro de la urbo. Tuta tiu tereno kaj ankaŭ la hodiaŭa centro kun la stratoj Gdańska, Dworcowa, Mickiewicza, Chodkiewicza, Cieszkowskiego, kun Piasta Placo, Pomorska, Focha kaj multaj aliaj formiĝis apenaŭ dum daŭro de 30 jaroj. Nekredeble. Sed vere. Efektive titana konstrua evento. Kaj kia arkitekturo aperis. Impona. Tiu de la lasta kvarono de XIX jarcento, tn. neostila, kaj plej ofte eklektika, laŭ la plej bonaj stilaj tendencoj fluantaj ĉefe el Berlino, krome ofte ankaŭ kunlabore de berlinaj arkitektoj kaj, kiu scias, eble pli bela ankoraŭ, tiu de la komenco de la XX jarcento, secesia, ankaŭ devenanta el Berlino, ofte ankaŭ kreita de bydgoŝĉaj arkitektoj. Ĝuste tiam oni komencis paroli pri Bydgoszcz kiel pri "malgranda Berlin" kaj estis tio komplimento por kaj bela, kaj parenca arkitekturo, kaj ega kvanto de verdaĵoj, kaj pri la akvo en la urbo, pri la rivero, pri la lagetoj, pri la fontanoj, kaj pri la modela ordo, kaj pri ĝenerala dinamiko de la urbo. Krome de 1911-a jaro Berlin kaj Bydgoszcz ligis du ĝemelaj monumentoj de nuda sporteca knabino streĉanta pafarkon. Arkpafistino de Bydgoszcz transdaŭris.

Koncepto por disvolvo de Bydgoszcz kiel urbo-ĝardenon subtenita estis post ricevo de sendependeco en 1920-a jaro. Mirakla, verda vilaa kvartalo Bielawki, en kiun jam tute antaŭnelonge oni enskribis muzikan kvartalon kun filharmonio, Muzika Akademio, muzikaj lernejoj, internulejoj. Kiel dankesprimon por ricevita libereco de la Patrujo oni starigis potencon konstruajaron de Baziliko de St. Vincento a Paŭlo. Tio estas nova arkitektura akcento, sed de tiam dominanta preskaŭ sur tuta urbo.

Kaj ankaŭ mi dezirus paroli ankoraŭ pri nuntempo, pri teatro, pri opero, pri fabrikoj, stadionoj, altlernejoj, pri novaj loĝkvartaloj, pri ĉirkaŭaĵoj de la urbo, tiel amikecaj, arbaraj, lagaj, pri planoj, pri reveno de la urbo al la rivero... Sed, tamen, albumo, enkonduko, vizitkarto, kaj ĉio pro la rivero Brda, por rememorigi kion skribis iu bernardiano en 1604-a jaro: *"Dank' al tiu bonfara rivero, la urbo venis al tia splendo kaj riĉeco, ke multaj nobeloj vidante, ke ilia posedaĵo malgrandiĝas, direktas sin al ĝi, por ke acetante grenon kaj sendante ĝin al Gdańsk, kovru la deficiton. Civitanoj, ja, siajn filinojn donante al ili kiel edzinojn, donacas al ili nemalbonan doton. Kaj tio estas la kaŭzo, pro kiu Bydgoszcz prioritatas antaŭ ĉiuj urboj de Pola Reĝlando."* Ĉio pro la rivero Brda. Albumo ankaŭ. Simple - Urbo sur la rivero ... Urbo en Eŭropo ... do, tie-ĉi!

(Materialo ricevita de **Andrzej Grzebowski**)

Grava Estrarkunsido pri Esperanto-arangoj en Bydgoszcz

En la urbodomo de Bydgoszcz okazis estrarkunsido de la Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, kies prezidanto Konstanty Dombrowicz estas samtempe Prezidento de la urbo Bydgoszcz (400 mil da loĝxantoj).

La Prezidento de la Urbo enmanigis al cxiuj gastoj kiel dank'esprimo pro la kunlaboro – albumon pri Bydgoszcz kun aldona presita teksto en Esperanto (kiun ni kunsendas kiel aldonaxo).

Sekve oni pridiskutis la promociadon de la urbo Bydgoszcz pere de Esperanto. Estis akceptita plano de la plej proksimaj arangoj, en kiu la cxefaj promociaj E-arangoj estas:

- **Zamenhofaj Tagoj** en Bydgoszcz dum 3-10 de decembro 2004 j. kun ISTK/AKB Sesio pri „Lingvoj, sano, amo en turismo”. La partopreno dum 3-10 decembro kun ok tranoktoj en studenta

domo en Bydgoszcz kostas 100 Euroj au 100 USD. La detalan programon de ZT en Bydgoszcz ni sendas sube.

- **Internacia Pedagogia E-Kurso** dum 11-20 de februaro 2005, kiun gvidos Asci. Ewa Bondar de IEI en Hago, Asci Augusto Casquero de la Cruz, red. Barbara Pietrzak el Pola Radio, Marcel Delforge el Belgio, kelkaj polaj fakuloj pri glottodidaktiko kaj pedagogio el la Centro pri Edukado por Instruistoj kaj reprezentantoj de ILEI. Samtempe okazos kursoj de fotado kaj video-filmado gvidataj de Zdzislaw Blazejczyk, red. Roman Dobzynski kaj Romuald Puciul. Cxiuj kursoj dum 11-20 de februaro kun nau tranoktoj, asekuro kaj parta mangxado kostos 200 Euroj au 200 USD.
- **30 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz** kun 27 Internacia AKB-Sesio kaj Internacia Kurso por Esperantovojagxgvidantoj dum 23 aprilo – 3 majo 2005 sub Honora Protektado de la Prezidento de la Urbo Bydgoszcz – Konstanty Dombrowicz. La arangxo same kostos 200 Euroj au 200 USD.

Eblas ankaŭ aligxi por Vintra-Printempa Semestro de ISTK/AKB en Bydgoszcz dum 17 de januaro gxis 3 de majo 2005. La studadkosto estas 200 Euroj au 200 USD + logxado, mangxado kaj asekuro (cx. 100 Euroj au 100 USD monate).

Eblas jam aligxi por la studado cxe ISTK/AKB en Bydgoszcz por la studjaro 2005/2006. La studadkoto gxis la 31-a de decembro 2004 estas sama 200 Euroj au 200 USD, informojn ni sendos lau peto.

La estrarkunsido finigxis per komunaj fotoj en la belega historia prezidenta salono de la urbodomo en Bydgoszcz. Poste oni vizitis urbon Bydgoszcz kaj ankaŭ Instituton pri Geografio de Bydgoszcz-Akademio, kie instruas AProf. dr.hab. Aleksandra Kowalczyk, sub kies scienca patroneco jam pli ol 50 gestudentoj de ISTK bakalaurigxis kaj magistrigxis cxe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Oktobre en Bydgoszcz-Akademio komencis instrui la hispanan lingvon Augusto Casquero de la Cruz, kiu eble tie instruos ankaŭ Esperanton.

Venu al Bydgoszcz por kune kun gestudentoj el 15 landoj de Afriko, Azio kaj Europano studi turismon, kulturon kaj lingvojn en la sola en la mondo klerigejo, kie oni cxiutage instruas en Esperanto.

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo

str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

tel/fakso: (48-52) 346-11-51, info@esperanto-turismo.com

[http:// www.esperanto-turismo.com](http://www.esperanto-turismo.com)

ESPERANTO en BRITIO: NOVAĴLETERO N-ro 1 eo / 9 (4 Oct 2004)

** Ĝisdatigante vin pri Esperanto en Britio - Esperantlingva versio **

[Por aliĝi aŭ nuligi, mesaĝu al la redaktoro]

Persona novaĵletero, por sekvi Esperanto Britain Newsletter

1. Esperanta publiko estas "propagando" - laŭ La Brita Esperantisto!
2. Publikaj eventoj en Britio: oktobro/novembro
3. Komentario: Por kio EAB?
4. Kaj nun al aliaj!
5. El 'La Brita Esperantisto' aŭtuno 2004, paĝo 24:
6. El 'La Brita Esperantisto' aŭtuno 2004, paĝoj 2,3:

7. Retren: Novaĵletero Esperanto Britain n-ro 4 (2004 majo 18)

1. ESPERANTA PUBLICO ESTAS "PROPAGANDO" - LAŭ LA BRITA ESPERANTISTO!

Planoj por publika informado de Esperanto-Asocio de Britio por la centjariĝo de la landa asocio estas trivialigitaj kiel "propagando", kaj "publico cele nur al publico" de ilia propra organo La Brita Esperantisto.

La planoj estis ellaboritaj fare de la elektita komitatano por informado en la asocio, kune kun ilia Publica Oficisto, kaj ilia eksa Informoficisto. "Estas tre malkuraĝige", komentis Heleno Fantom, kiu direktas la informadon en la asocio.

"La publica plano origine antaŭvidis iom da enplektiĝo kun la ĉijara Brita Kongreso de Esperanto, sed rapide evidentiĝis ke estus malmulte da intereso", komentis la antaŭa Informa Oficisto de EAB, Ian Fantom.

Komentario en Esperanto Britain Newsletter - la anglalingva novaĵletero de la brita sekcio de Ĝangalo - demandis en majo, ĉu la brita movado estas tro internenrigardema. Tiuj komentoj provokis la redaktoran artikolon en La Brita Esperantisto.

"Se eksteruloj tiun jubileon malatentis, se vere estis maltrifita propaganda aŭ - kiel oni hodiaŭ politike-korekte preferas - informa eblo, do tiel estu", diras la Esperantlingva ĉefartikolo.

La senprecedenca redaktora komentario estis kondamna ankaŭ pri Esperanto Britain, kiun redaktis Ian Fantom post sia retiriĝo kiel Informoficisto de EAB. "Ĉu la raportoj en Esperanto Britain vere aspektas kiel propagando cele al trompado de cinikaj ĵurnalistoj?", demandas Ian Fantom. "Ekde la 1970aj jaroj, kiam mi starigis la Komitaton pri Gazetaraj kaj Publikaj Rilatoj por Brita Esperanto-Asocio, mi insistadis eltranĉi la propagandon kaj troigon, kiuj tutsimple ne helpis al la agado. Ni bezonis nur konstantan fluon da interesaj novaĵoj por ke homoj konstatu ke Esperanto vivas kaj bonstatas, kio estas tute vera."

"Estas preskaŭ kvazaŭ estus du movadoj en la Asocio: kiam ajn unu mano moviĝas, la alia moviĝas por ĝin frapi", li daŭrigas, "Ĝuste pro tio mi ne daŭrigis kiel Informoficisto en EAB, kaj nomumis la novan prezidanton. Almenaŭ, mi sentas malŝarĝiĝon nun ke tiu afero finfine estas malferma en la publika regno. Nun estas por aliaj agi se ili deziras antaŭenigi la aferon". La Britan Esperantiston oni distribuas al la membraro, sed ĝi aperas ankaŭ publike en la retpaĝejo de la asocio.

La plano pri publika informado estis elpensita por subteni edukajn iniciatojn en la instruado de la lingvo kadre de la nova registrara Nacia Strategio por Lingvoj en Anglio, kaj ĝi estis bazita sur diskutoj kun edukistoj. Preskaŭ la sola parto de la origina plano kiu nun antaŭeniros estas stando ĉe la lingvofestivalo 'Language Show' en Londona ĉinovembre, kvankam la kerno de tio estas jam elprenita. Finfine la asocio organizis du prelegojn en Esperanto en Londono por la vendredo vespere kaj sabato matene (oktobro 8/9), kaj ĝi sendis kvinpundan ĉekon al ĉiu loka Esperanto-klubo, por kontribui al naskiĝtaga kuko, kun la espero ke tiu kuko kreos iomete de loka publico.

Tion ĉi mi ne vere volas diri al ili", li aldonis, "sed la granda novaĵo momente estas la asocio mem".

Ĝeneralaj informoj haveblas ĉe: TTT-ejo de EAB <http://www.esperanto-gb.org>, TTT-ejo de Esperanto Britain: <http://esperantobritain.com>. La TTT-ejo de La Brita Esperantisto estas subpaĝaro de tiu de EAB.

2. PUBLIKAJ EVENTOJ EN BRITIO: OKTOBRO/NOVEMBRO

Se vi ekas ĉe universitato ĉiaŭtune, ĉirkaŭrigardu por Esperanto en la novula semajno - speciale se vi estas ĉe la universitato de Oksfordo. Ilia Novula Semajno ekos je oktobro 4, kaj studento el Germanio organizas Esperanto-standon tie.

Se vi komprenas Esperanton kaj estas en la londona regiono, do kion pri ĉeesto de du prelegoj okaze de la centjariĝo de EAB ĉe La Londona Esperanto-Klubo? Profesoro John Wells liveros sian ĉe la regula klubvespero vendredon la okan, kaj D-rino Marjorie Boulton prelegos sabatmatene (oktobro 9) samloke. La vendreda parolado ekos je 19.15, sed la klubejo estos malferma inter 18.00 kaj 21.30. La sabata prelego ekos je 09.30, kaj la loko estos malferma de 09.00 ĝis 12.30. Manĝetaĵoj aŭ trinkaĵoj haveblos. Detalojn de La Londona Esperanto-Klubo vi povas havigi de ilia retejo ĉe <http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek-uni.htm>.

La Mastruma Komitato de EAB poste kunvenos en la sama konstruaĵo sabaton posttagmeze ekde 13.00. La tagordon mi ne vidis, sed se hazarde povus iel ajn esti io pri kio vi volas ilin mem alparoli antaŭ la kunveno, ilia retpaĝaro estas ĉe <http://www.esperanto-gb.org> kaj ilia retpoŝta adreso estas eab@esperanto-gb.org.

La Eŭropa Socia Forumo ĉe la londona ekspoziciejo Alexandra Palace oktobron 15-17 enhavos Esperanto-standon. Estos ankaŭ EAB-stando ĉe Language Show [Lingvofestivalo] en la ekspoziciejo Olympia en Londono novembron 5-7. Ĉiuj membroj de EAB ricevos senpagan bileton, mi aŭdis. Eventualaj helpontoj kontaktu Helenon Fantom (helen (ĉe) esperanto.org - 01635 38592).

Meze de la Lingvofestivalo La Londona Esperanto-Klubo ekkunvenos ĉe sia nova hejmo, kun prelego de aktiva germana samideano dumtempe laboranta en Britio, Rainer Kurz (<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek-uni.htm>).

3. KOMENTARIO: POR KIO EAB?

La publika atako en La Brita Esperantisto pri aktualaj kaj pasintecaj penoj pri publika informado pri Esperanto en Britio, fare de la propra organo de Esperanto-Asocio de Britio, estas senprecedenca.

La redaktora ĉefartikolo en la aŭtuna numero 2004 aludas demandon metitan de novaĵletero de la brita subportalo de Ĝangalo, Esperanto

Britain: "Ĉu la Esperanto-movado en Britio estas tro internenrigardemo?" Per rubigo de pli-malpli la tuta publika laboro farita de la Asocio mem, kiel ankaŭ tiu de Esperanto Britain, la redaktoro de La Brita Esperantisto sukcesis nur substreki la demandon. La demandon plusubstrekas kelkajn paĝojn poste redaktora noto kiu rubigas jardekojn da dediĉita laborado fare de Esperanto Lobby, kiel ankaŭ de la Parlamenta Esperanto-Grupo, kiu iutempe altiris subtenon de pli ol duono de la elektita ĉambro la la brita parlamento, kaj kiu iam enhavis pli da parlamentanoj ol la reganta partio.

Reage al la sugesto de internenrigardemo, la redaktora artikolo 'Redaktore' en 'La Brita Esperantisto' diris, "Mi malkonsentas". Ĝi daŭrigis, donante kvar ekzemplojn de penoj de britaj Esperantistoj por antaŭenigi la aferon. El tiuj projektoj tri establiĝis sekve de miaj propraj klopodoj en antaŭa formo de tiu ĉi Novaĵletero (kaj mi persone persadis du el la enplektitaj homoj realiĝi al la Asocio). La tria temis pri iu komerca korespondado rilate al iliaj kursoj.

Do, ĉu EAB temas nur pri la produktado de grafike altira lernmaterialo por homoj kiuj hazarde jam decidis lerni Esperanton? Ĉu EAB estu reduktita al nura eldonejo, kongreskunordigo kaj hejmo por specialista biblioteko? Kies politikdecido estas tiu ĉiukaze? Dum mia tempo kiel Informoficisto mi sciis nenion pri tia politikdecido. Ĉiukaze, tiajn aferojn ne rajtas decidi la komitato - kaj tiurilate eĉ ne la redaktoro de La Brita Esperantisto. EAB estas membra asocio, kaj estas por la membroj de EAB decidi.

La fina alineo de 'Redaktore' en 'La Brita Esperantisto' bele esprimas la sintenon: "Se eksteruloj tiun jubileon malatentis, se vere estis maltrafita propaganda aŭ - kiel oni hodiaŭ politike-korekte preferas

- informa eblo, do tiel estu. Ekzistas momentoj, kiam oni volas private, asocie, interne festi, rezignante pri vanaj gazetaraj komunikiloj, ĝis prezentos sin aŭtentike raportinda evento pri la nepreco de Esperanto."

Ĝuste ĉi tiajn aferojn mi aludis en miaj redaktoraĵoj en 'Esperanto Britain Newsletter', kaj la kaŭzo ke mi nomumis la novan prezidanton de EAB. La publika plano origine antaŭvidis iom da enplektiĝo kun la ĉijara Brita Kongreso de Esperanto, sed rapide evidentiĝis ke estus malmulte da intereso. Mi tre ĝojis kiam Profesoro Wells akceptis la prezidantecon, ĉar li estas bone respektata kaj interne kaj ekstere de la movado, kiel ankaŭ helpema kaj kunlaborema en la agado pri publikaj rilatoj. Kune ni sukcesis pri tri gazetaraj bultenoj en lia unua tago kiel prezidanto, sed tion ne menciis la eldonaĵoj de la propra Asocio. Mi jam atendis ke la malfacilaĵoj en la komitato fordegelus dum iom da tempo. Finfine tamen ili ŝajne tutsimple eliris la komitaton kaj en la publikan regnon.

Ĉu la raportoj en Esperanto Britain vere aspektas kiel propagando cele al trompado de cinikaj ĵurnalistoj? Ekde la 1970aj jaroj, kiam mi starigis la Komitaton pri Gazetaraj kaj Publikaj Rilatoj por Brita Esperanto-Asocio, mi insistadis eltranĉi la propagandon kaj troigon, kiuj tutsimple ne helpis al la agado. Ni bezonis nur konstantan fluon da interesaj novaĵoj por ke homoj konstatare ke Esperanto vivas kaj bonstatas, kio estas tute vera.

Do kio okazas en EAB? Estas preskaŭ kvazaŭ estus du movadoj en la

Asocio: kiam ajn unu mano moviĝas, la alia moviĝas por ĝin frapi. En unu okazo, nova estro de kolegio petis grupon de Esperantistoj pri ideoj. Mi demandis pri la ebleco de mallongaj kursoj por eksterlandoj parolantoj de Esperanto kiuj ŝatus trejniĝi por esti klasĉambraj lingvojhelpistoj en Britio, kiel antaŭvidite en la nova Nacia Strategio por Lingvoj en Anglio. Ŝi efektive tre interesiĝis, kiel mi poste eltrovis kiam mi atingis ŝin por pludiskutado, kaj ankaŭ ŝi havis proprajn ideojn. Tamen la reago dum la kunveno fare de la Esperantista kursdirektoro estis: "Ian, pri tio ne temas EAB!". Tiu afero nun estas preter interna politiko; ĝi levas la fundamentan demandon pri kio temas EAB.

Se tiu movado-en-movado transprenus EAB entute, ĉu do EAB restus ankoraŭ bonfara organizaĵo? Se jes, por kies gajno? Ĉu ĝi estus bonfara organizaĵo por la publika bono, enkondukante neŭtralan kaj facile lerneblan duan lingvon por ĉiuj? Aŭ ĉu ĝi estus bonfara organizaĵo por la bono de kompatindaj anglalingvaj Esperantistoj kiuj tutsimple deziras ĝui esti inter aliaj kompatindaj anglalingvaj Esperantistoj? Se tiel, kiel oni tion pravigus al la impostopagantoj?

Ĉu laborado por Esperanto estu ekskluziva afero, kun malmulta rilato al la ekstera mondo? Ĉu ĝi estu organizata por tiuj kiuj eble estus same kontentaj parolante la klingonan? Ĉu ni vere devus superece turni nin for de publikaj figuroj kiuj pretas subteni la aferon sen mem lerni la lingvon? La etigo de la influhava laboro de W. T. Stead surbaze de tio ke li ne uzis la lingvon en la propra familio estas priridinda.

Mi supozis ke ni trairis tiun stadion jam en la 1970aj jaroj, kiam finfine ni sukcesis komprenigi: "Ne petu al ili lerni Esperanton!". Unu granda atingo de la Parlamenta Esperanto-Grupo estis komprenigi al la publiko ke oni povas esti respektinda ĉe flua politikisto kaj subteni Esperanton. La parlamentanoj ankaŭ iom premis

ĉe la ekzameninstancoj GCE, el kiuj unu estis ĵus produktinta raporton dirante ke ne eblus starigi ekzamenon de Esperanto kun la sama malfacilo kiel por la aliaj lingvoj.

La grupo pri gazetaraj kaj publikaj rilatoj en Brita Esperanto-Asocio

- kiu tiutempe faradis tion kion nuntempe provadas fari iuj en EAB - dissendis gazetaran bultenon: "Esperanto tro facila, diras GCE-estraro". Tiu gazetara bulteno - apenaŭ kredeble - reeĥis de tempo al tempo en la gazetaro eĉ jardekon pli poste. Ĉu post tio iu ajn respektinda edukisto iam ajn denove povus produkti tian rubon pri Esperanto? Tion povas respondi nur Dio, kaj la redaktoro de La Brita Esperantisto ne estas Dio. Kelkajn jarojn pli poste, Esperanton oni kviete akceptis por la nova lerneja ekzameno (kiu sekvis GCE) GCSE.

Kion opinias vi, la legantoj? Diru ne nur al mi; diru al ili! Estos komitatkusido de la Mastruma Komitato en Londono oktobron 9 je 13:00 ĉe La Londona Esperanto-Klubo. Kontaktodetaloj por komitatanoj estas en ilia TTT-ejo (<http://www.esperanto-gb.org>) kaj Esperanto House devus povi plusendi retpoŝtajn mesaĝojn se vi sendos ilin al eab

(ĉe) esperanto.org aŭ telefonos al 0845 230 1887 .

4. KAJ NUN AL ALIAJ!

Kion oni faru per malbona novaĵo en populariga novaĵletero? La ĉimonata novaĵo estas kaj granda kaj malbona. La organo de Esperanto-Asocio de Britio rubigis pli-malpli la tuton de la publika laboro kiun iam ajn faris la Asocio, kiel ankaŭ la Esperanta Premgrupo 'Esperanto Lobby', la brita Parlamenta Esperanto-Grupon, kaj la britan portalon de Ĝangalo, Esperanto Britain. Do, mi fine tutsimple ĉesis pri ĉio.

Ĝis nun, ĉi tiaj aferoj estis for de la ĉeflumo, sed ĝuste sub tia malkuraĝiga premo mi penadis labori dum iom da tempo, kaj tio estis al mi granda streĉo. La publiko povas esti tre simpatia pri Esperanto, kaj oni aŭdas okazan voĉon kiu demandas kial oni ne bone merkatadis Esperanton. La reprezentanto de Unesko ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Brazilo diris al la mondo ke Esperanto estu farita pli videbla al la ĝenerala publiko.

La fama kampanjada ĵurnalisto W.T. Stead demandis en la protokolo de la unua komitata kunveno de La Brita Esperantista Asocio (Inc) en 1904, "Kiu estas kontraŭ Esperanto?" Mi provas preni konsilon de homoj kiuj scias pri kio ili parolas. Tiukaze, kiu nun kontraŭas la antaŭenigon de Esperanto inter la publiko, kaj kio ilin motivigas? Estis okazaĵo en la yahoo-grupo esper-brit ĉirkaŭ la tempo de la iraka invado kiam komitatano de Skota Esperanto-Asocio penadis flankenigi diskutadon for de Esperanto en Britio, dirante ke Esperanto estas malŝparo de tempo. Estas multo kion vi ne volas aŭdi, kaj kion mi ne volas diri.

Se mi prilaborus popularigan kampanjon surbaze de tio kion mi vidas, kaj sekvante la ideojn de Stead, mi atingus apenaŭ ion ajn krom propra elĉerpiĝo. Tio verŝajne ĉiukaze ne estus aparte fruktodona, se iuj el tiuj kiuj kontraŭas la antaŭenigon de la afero inter la publiko mem estas en influaj pozicioj en la Esperanto-movado. Ĝuste pro tio mi ne daŭrigis kiel Informoficisto en EAB, kaj nomumis la novan prezidanton. Almenaŭ, mi sentas malŝarĝiĝon nun ke tiu afero finfine estas malferma en la publika regno. Nun estas por aliaj agi se ili deziras antaŭenigi la aferon.

Pro tio mi decidis retiriĝi de publika informado por la Esperanto-movado en Britio.

5. EL 'LA BRITA ESPERANTISTO' AŬTUNO 2004, PAĜO 24:

Pri la Esperanto-Lobio

Rik Dalton

En LBE, printempo 2004, vi mencias ian kvazaŭan kalumnion fare de la respondeculo de la iama [i]Esperanto Lobby[/i].

Mi kredas, ke [i]Esperanto Lobby[/i] estis eble la plej grava atingo por la internacia lingvo en Britujo en la 20a jarcento. Pro ĝi, pli ol duono de la brita parlamentanaro montris sin preta deklari subtenon por Esperanto.

Ĉu EAB konsultis juriston por havigi opinion, ĉu ekzistis vera kialo timi proceson pro la sugestita kalumnio? Mi ne konas la enhavon de la priplenditaj komentoj sed, laŭ onidiro, temis pri komparo, kiu eble estis sentakta sed tute ordinara en politikaj disputoj nuntempe.

Ĉiukaze, kial necesis malfondi [i]Lobby[/i]? Mi scias, ke eble kelkaj anoj ne ŝatis priparlamentan agadon, kiun ili malprave konsideris kondamninde politika, sed la malfondo estis najlo en la ĉerko de Esperanto en Britujo.

[NDLR: [i]La Esperanto-Lobio en la 1980aj kaj fruaj 1990aj jaroj ja unuigis pli ol duonon de la politike plej diversaj parlamentanoj, kiuj deklaris sin pretaj subteni Esperanton. Aliflanke, subteno tia neniel protektis la iaman GCSE-ekzamenojn en Esperanto aŭ pliprestigigis la internacian lingvon kadre de la tiam enkondukata nacia studprogramo, malgraŭ klopodoj de i.a. Stephen Thompson kaj aliaj membroj de la ne plu funkcia [i]Esperanto Teachers Association[/i].

Argumenteblas, ke la lobio konstruaĵon kreis ne brikan sed ludkartan: en aprilo 1994, pro gazetara komunikaĵo de EAB, en kiu la asocio listigis lobianojn, [i]The Guardian[/i] ridindigis Esperanton, ŝercante pri la 'astonishing gallimaufrey' kunigita en [i]Esperanto Parliamentary Lobby[/i] (1994-03-26); samepoke la gazeto primokis la deputiton, Stan Newens, kiam tiu pledis por Esperanto (1994-04-19). La mesaĝo klaris: neni 'serioza' politikisto asociiĝu kun 'galimatia' afero Esperanto.[/i]

6. EL 'LA BRITA ESPERANTISTO' AŬTUNO 2004, PAĜOJ 2,3:

Redaktore

Ĉu la brita Esperanto-movado tro emas enen rigardi. t.e. al si mem, anstataŭ eksteren, t.e. al la neverda mondo? Jen demando cirkulanta en la interreto post la Brita Kongreso en Felixstowe. La demandanto, artikolante en la angla lingvo en la retforumo [i]Esperanto Britain[/i], argumentas ke la 'ĉefa problem' frontanta al la brita movado rilatas al ties internemo. Mi malkonsentas.

Aktivas membroj de nia asocio ekzemple en diversaj eksteraj projektoj: plej notinde, eble, en edukaj rondoj. Elizabeth Stanley senlace laboras en Glostersiro por akceptigi Esperanton kiel studfakon en tieaj lernejoj (tiom da bruo ŝi faras, ke iama studenta amikino mia - ne-esperanta - en la regiono mesaĝis por demandi, ĉu mi konas tiun, kiu tiel levas la profilon de Esperanto); Derek Tatton interrilatas kun la Universitato de Liverpolo por certigi la estontecon de la [i]Buchanan-[/i]prelegoj; Malcom Jones kaj Elizabeth Stanley celis aranĝi seminarion pri Esperanto-instruado por elementnivela pedagogoj (la seminario fine ne okazis, tamen farita estas la provo); ka Angela Tellier intertraktas kun firmao [i]Bessacarr[/i] pri eldonado de prestiĝaj, profesie produktotaj informiloj. Jen esperantistoj engaĝantaj kun publikaj kaj privataj organizaĵoj: konsilantaroj, universitatoj kaj komercaj kompanioj.

Ne temas ĉi tie pri publiko cele nur al publiko: tiu trompas neniun (des malpli cinikajn ĵurnalistojn harditajn kontraŭ klopodoj prezenti propagandon kvazaŭ ĝi estus novaĵero). Pro tio ĝemigis min komentoj el la sama retforumo, ke okaze de la kongreso britaj esperantistoj maltrafis la eblon ekspluati la centjarigon de nia asocio (fondita en aŭtuno 1904) por kapti la atenton de la ekstera mondo.

Mi legis, ekzemple, ke 'faritaj estas ambiciaj planoj por revivigi la vidatecon [i][tiel][i] de Esperanto inter la brita publiko, celantaj la patron de la brita Esperanto-movado, la faman kampanjantan ĵurnaliston W. T. Stead'. Strange: miascie, unu individuo - nur unu - lanĉis proprainiciate 'ambiciajn planojn' tiajn, kiu ne adoptiĝis de la Loka Kongresa Komitato. Kaj prave: kiel mi atentigis en mia kongresa Stead-prelego, tiu ĉi eminentulo, malgraŭ sia helpo al la frua Esperanto-movado en nia lando, apenaŭ parolis la lingvon kaj almenaŭ private, familie, neniel rekomendis aŭ praktikis ĝin. Krome, ĝis kiu grado Stead nuntempe famas? Mi, kiu trejniĝis kiel ĵurnalista, gajninte fakajn kvalifikojn, konsciis pri Stead, nur post kiam mi forlasis la profesion. Richar Branson ne reklamas nunajn transatlantikajn flugojn surbaze de la pioniraj atingaĵoj de Wilbur kaj Orville Wright; same Esperanto-Asocio de Britio ne varbu novajn adeptojn helpe de la (re)nomo de iu, kiu laŭateste restis eterna komencanto.

En Felixstowe EAB-anoj dece kaj dance, kune kaj kuke festis la centjariĝon de la asocio. Se eksteruloj tiun jubileon malatentis, se vere estis maltrafita propaganda aŭ - kiel oni hodiaŭ politike-korekte preferas - informa eblo, do tiel estu. Ekzistas momentoj, kiam oni volas private, asocie, interne festi, rezignante pri vanaj gazetaraj komunikiloj, ĝis prezentos sin aŭtentike raportinda evento pri la nepreco de Esperanto.

Paul Gubbins

7. RETREN: NOVAĴLETERO ESPERANTO BRITAIN N-RO 4 (2004 MAJO 18)

Jen la komentoj en la maja novaĵletero, al kiuj aludis la redaktoro de La Brita Esperantisto. La artikolo 'Redaktore' aludas al la tria ero, sed la leteron kiu demandas pri Esperanto Lobby eble iniciatis la dua ero. La unua ero, pri premagado por la EU-baloto en junio, donas gusteton de la speco de agado kiun ni entreprenis en la 1970aj jaroj rilate al la brita parlamento (La elsendo de BBC menciita sube eliris pli poste).

* La balota kampanjo por la Eŭropa Parlamento nun ruliĝas. Hieraŭ, la Verdula Partio lanĉis sian kampanjon, kaj tiurilate intervjuiĝis en tagmeza televido Caroline Lucas, kies bildo aperis antaŭ nelonge en Esperanto Britain. Almenaŭ, ŝajne la verduloj parolas pri eŭropaj aferoj prefere ol pri nurbritaj aferoj. Dum tio ekruĝas, la nacia Esperanto-Asocio montras signojn ke ĝi fariĝas pli elirema denove. La voko de profesoro Wells meti la lingvan debaton ĉe la kernon de la EU-balota kampanjo rezultis en la pretigo de radioprograma priesplora ero por la regula elsendo 'You and Yours' [Vi kaj viaj] de BBC Radio 4, inkluzive de intervjuoj kun profesoro Wells, aŭtoro Marjorie Boulton, kaj la familio Tellier. Bedaŭrinde, la programero estis eltranĉita lastmomente. Ĉiukaze ŝajnas do esti intereso ekstere en la mondo. Ironie, la sola nacia publiko dum la Brita Esperanto-Kongreso estis por la kongreso de 1969, en artikolo en la nacia gazeto The Guardian (<http://books.guardian.co.uk/review/story/0,12084,1206952,00.html>). La sekvan semajnon aperis letero de neEsperantisto, kun sugesto pri Esperanto por EU (<http://books.guardian.co.uk/review/story/0,12084,1211171,00.html>).

* La premgrupa cirkulaĵo, aliloke priskribita, nun estas elsendita surpapere al lokaj Esperanto-klubo kaj lokaj reprezentantoj tra Britio. Tio reprezentas revivigon de la premagado kiu viglis ekde la 1970aj jaroj ĝis la 1990aj jaroj. Neniam mi komprenis kial oni mortigis tiun agadon. Tio iel rilatis al malbona prijuĝo en elsendo de gazetara bulteno, kiu ofendis kelkajn EP-anojn, sed tiaj aferoj ja povas okazi. Estas bedaŭrinde ke preskaŭ kvar jardekoj da kampanjado ĉe frontoj parlamenta kaj publika finu tiamaniere por la organizanto Brian Barker, kiun mi mem entiris en la naciskalajn popularigajn agadojn, kiel respondeculo por gazetaraj kaj publikaj rilatoj en la fruaj sepdekaj jaroj. Nun Eŭropo bezonas efektivan porEsperantan premagadon pli ol iam ajn antaŭe. Brian kaj mi restadis en kontakto dum la jardekoj rilate al la premagado. Ĉu iuj el niaj legantoj estas ankoraŭ en kontakto kun Brian? Eble nun la roloj povus esti inversitaj!

* Laŭ ĉiuj diraĵoj, la Brita Kongreso de Esperanto en Felixstow iris bone, kaj ĉiuj ĝuis. Sed momenton ... ĉu ne tiu devintus esti la jarcenta jaro de la nacia Esperanto-asocio en Britio? Mi scias ke ambiciaj planoj estis faritaj por revivigi la percepton de Esperanto inter la brita publiko, reliefante la fandan patron de la

Esperanto-movado en Britio, la faman kampanjadan ĵurnaliston W T Stead. Stead estis antaŭ cent jaroj ĝenerale konata nomo, kaj eĉ nun ekzistas periodaĵo dediĉita al lia laboro. Mi ĉirkaŭfosis en la Biblioteko Butler en Barlaston, kaj trovis sufiĉe interesan enkondukon al kampanjado por Esperanto, verkita de Stead en la protokolo de la unua komitatkunveno de Brita Esperantista Asocio en 1904. "Kiu estas kontraŭ Esperanto?" li demandis. La problemo pri Esperanto, li klarigis, estas ke neniu vere kontraŭas ĝin; ĝi estas vere sufiĉe bona ideo. Pro tio estas malfacile kampanji por ĝi! Alemanŭ, tio estis la ĝenerala fadeno. La kontrasto inter la epoko de Stead kaj la nuntempa viglo de la tutmonda Esperanta junulara kulturo estus farinta tre interesan aliron al la rekaptado de la publika imago. Do kiu nuntempe kontraŭas Esperanton? Tion mi ne scias, sed mi ja certas ke la ĉefa problemo estas la enternenrigardemo de la movado. Kiel mi diris, la Britan Kongreson ĝuis ĉiuj.

ESPERANTO en BRITIO: NOVĴLETERO

Redaktas: Ian Fantom

Rete: ian@esperanto.org Tel: +44 (0)1635 38592 Fax: +44 (0)1635 38592

ESPERANTOLOGIO CHE MILANA UNIVERSITATO

Vendredon la 26an de novembro 2004, je 15h00 en Salono Marconi de Universitato IULM (via Filippo da Liscate 1, 20143 Milano -- metrostacio Romolo), d-ino Perla Martinelli prezentos sian verkon "Edmond Privat: la vita e l'opera", eldonitan de Itala Interlingvistika Centro. Enkondukos Lia Vicrektora Moshto prof. d-ro Mario Negri. La verko estas bazita sur la unua doktorigha disertacio en itala lingvo (universitato de Ghenovo) dediĉita al la fama pioniro de Esperanto. Ghi estas ankaŭ la plej kompleta pri Edmond Privat, ĉar ghi traktas ĉiun faceton de lia aktiveco: trilingva verkisto kaj publicisto, apostolo de la paco, standardisto de la sendependigho de ĉiuj ne liberaj popoloj, amiko de Gandhi, religia sinkretisto, mondfederalisto, socialisto kaj, kompreneble, ambasadoro de Esperanto. Nia lingvo estas fakte la sola komuna matrico kiun ni retrovas en ĉiu lia aktiveco, apud certa interpreto pri la svisa identeco. Por pliaj informoj: la redakcio de HeKo au sen. Andrea Montagner.

EUROPA SOCIA FORUMO EN LONDONO

Disvolvighas en Londono dum ĉi tiuj tagoj la tria Europa Socia Forumo. La Esperanta Civito cheestas per sen. Mayra Nuñez Hernández. La duan Forumon, en Parizo, ghi cheestis per sen. Dieter Rooke. Kompare kun la antaŭaj, la nuna Forumo havas malgrandan (eĉ tre malgrandan, lau Florenco 2002) ehon, kaj ankaŭ Esperantio shajnas malpli videbla. Efektive la unua Forumo estis la plej granda sukceso, ĉu pro noveco, ĉu pro bonega organizo; sed precipe, kiel diras EU-parlamentano Agnoletto, "ĉar en Florenco kombinighis du protestoj: tiu kontraŭ la milito kaj tiu kontraŭ la novliberalismo: estis ĝenerala konscio ke la baldaua milito [en Irako] estis kondamnenda ne nur ĉar la militoj estas ĝenerale kondamnindaj, sed ĉar la milito estas la natura rezulto de la novliberalisma ondo. La klarvideco pri tiu plektigho iom perdighis lastatempe, kvazau oni revenus al la ideo ke la du elementoj estas nur paralelaj, kaj ne konverghaj." Tio shajnas konstatebla ankaŭ ĉe la esperantistaro partoprenanta en la sociaj forumoj. Pri ĉiuj sociaj forumoj (mondaj kaj europaj) nur unu esperanto-gazeto regule kaj senpartiece raportas, nome "Heroldo de Esperanto".

LA EKZAMENA LINGVO

Ekde 2005 esperanto estos la 25a lingvo pri kiu ekzistos oficiala testaro che la instanco deputita pri ekzamenplanado fare de la Konsilio de Europo. La atingon oni shuldas al la Esperanta Civito, unuavice al s-anoj Marc Hiltbrand kaj Giorgio Silfer. La Konsilio de Europo agnoskis, pere de sia instanco, Kulturan Centron Esperantistan (Svislando) kiel referencan institucion, lau indiko de la Kapitulo: KCE estas fakte la plej grava lingvolernejo alighinta al la Pakto por la Esperanta Civito, en Europo. KCE do iam okupos pri esperanto la saman rolon kiun, ekzemple, Universitato por Fremduloj en Perugia okupas pri la itala. La laboroj por la perfektigo de la ekzamena framo pri nia lingvo, bazita sur la direktivo agnoskita je europa nivelo (tri gradoj A-B-C, kun po du subgradoj), jam startis. KCE esperas fini ilin okaze de la Esperantologia Fakultato 2005 che KCE, kie lekcios prof-roj Duncan Charters kaj Giorgio Silfer, kaj fakulo USUI Hiroyuki. Esperantio ghojas pro tiu chi nova atingo de la raumismo.

HEROLDO DE ESPERANTO n-ro 2060: LA UNUA PAGHO

Per la tragedio en lernejo de Belsano malfermighas "Heroldo de Esperanto" n-ro 2060, la 13a en la jaro, akurate aperinta. Per fotoj, artikolo kaj poemo HdE kuraghe alfrontas la temon terorismo kaj ghian eventualan efikon al Esperantio. Ni menciu ke jam okaze de la 11a de septembro 2001 HdE dedichis la unuan paghon al la temo, el Esperanta vidpunkto. La fruntan artikolon apudas informoj la konvergho de mondcivitismaj skoloj, nun okazanta kun la rekta envolvigho de esperantistoj. Interesa analizo pri la pluraj tendencoj en la Akademio de Esperanto karakterizas la fundan artikolon. La paghon kompletigas artikoloj pri la Tago de la Lingvoj, pri Varsovia iniciato cele al Europa Unio kaj pri la 20aj Artaj Konfrontoj.

En la internaj paghoj, la kutimaj interesaj rubrikoj kaj multaj objektivaj informoj pri lumoj kaj ombroj en la Esperanto-mondo. "Heroldo de Esperanto" aperas chiun trian semajnon. Posedas, eldonas kaj administras: LF-koop, CP 928, 2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Provezzemplero petebla che <lf-koop che esperantio.net>.

BUNTA GAMO DE LITERATURO EN LA OKTOBRA NUMERO DE "LITERATURA FOIRO"

Per la uvertura aperigo de manuskripto de la vastekonata poemo "Vi estas maro" la revuo omaghas la 80-jaran jubileon de William Auld. Originala esperanta literaturo en la oktobra numero de revuo "Literatura Foiro": rakonto "La domo" de Sten Johansson, poezia triptiko de Marie-France Conde-Rey, humurajho "Rememoroj pri dolcha patrino" de Ruben Feldman-Gonzalez, poemo en prozo "Sablo-shtormo" de Christian Riviere. Okaze de la forpaso de la redakciano Johan Hammond Rosbach aperas bibliografio de liaj verkoj kaj recenzoj pri liaj libroj en revuo "Literatura Foiro".

Mondliteraturo: poemo "La spiro de la nokto" de Grytzko Mascioni en traduko de Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli, kun komentario de Giorgio Silfer, du junaj vochoj el Brazilo en traduko el la portugala de Pekim Tenório Vaz, rakonto "Doudou" de Isaak Babel en traduko el la rusa de Grigorij Arosev, pagho el "Bonan tagon, tristeco" de

Françoise Sagan en traduko el la franca de Perla Martinelli, chapitro el "Siddhartha" de Hermann Hesse en traduko de Bertil Nilsson. Fakte "Siddhartha" estas parto de la temo "Esperanto kaj budhismo" traktata en la oktobra numero, ankaŭ per recenzo ese de Rolfo pri "Kelkaj faktoj pri la budhismo" de Gunnar Gallmo kaj recenzo de Venelin Mitev pri "La Dharmo-pado" tradukita de Gunnar Gallmo. Perla Martinelli autoras eseon pri Czeslaw Milosz. La numero vaste informas pri la mondkongreso de PEN Klubo Internacia okazinta pasintseptembre en la norvega urbo Tromso. Per la bonveniga saluto de la vicprezidanto de KCE Perla Martinelli kaj la unua parto de la prelego "Komunikado kaj reprezento" de Giorgio Silfer, LF komencas aperigi la kontribuojn al la Simpozio pri la esenco kaj estonteco de Esperantio. La dramaturgo Ljubomir Trifonchovski raportas pri naskigho de nova ghenro en la verda teatro, per la spektaklo pri la polaj eventoj kadre de la Kultura E-Semajno en Chaudéfono pasintan auguston. Dimitar Haghiev komentarias recenzon en LF pri libro de ak. André Cherpillod. Radoslaw Nowakowski meditas pri la bezono de arto. En la oktobra numero la legantoj de "Literatura Foiro" povas sekvi la duan parton de la ese "Pri la juda klerismo kaj esperanto iom pli vaste" de Zofia Banet Fornalowa. Revuo "Literatura Foiro" estas la plej longe senchese aperanta literatura kaj kultura revuo en esperanto: en 2004 estas la 35-a jarkolekto. Ghin posedas, eldonas kaj administras Kooperativo de Literatura Foiro. Organo de la Esperanta PEN-Centro. Chefredaktoro: Ljubomir Trifonchovski. Redakcia adreso: p.k. 26, BG-3000 Vraca (Bulgario), retadreso lofo@bluewin.ch . Perantoj en 37 landoj. Administrejo: LF-koop, CP 928, CH-2301 La C.haux-de-Fonds (Svislando), <lf-koop@esperantio.net>.

PLURAJ ANIMOJ EN LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Kutime la publiko ne konscias, ke la akademianoj ne perceptas nian lingvon sammaniere. Principe ekzistas kvar interpretoj: che unu ekstremo la "bonlingvisma", kie chefrolas la nuna sekretario, ak. Corsetti; che la alia ekstremo la pichisma, kie situas precipe eksaj au forpasintaj akademianoj (De Diego, Hauptenthal, Pich); inter tiuj du ekstremaj aloj – PIVistoj kaj raumistoj. Lau raumismo, Eo estas la vivanta lingvo de vivanta diaspora popolo. Tio kondukas unuflanke al fideleco al la Fundamento (kontraŭ alfabetaj reformproponoj, ekz.), aliflanke al konsento pri natura evoluo, kiun grandparte atestas ankaŭ PIV. * Male, la linio Corsetti-Piron koincidigas pichismon kaj PIVismon, tial ghi jam plurfoje distancighis de PIV. Lastatempe ech aperis la ideo ke la Akademio de Esperanto faru deklaron kontraŭ la vortaro eldonita de SAT. La nova eldono de PIV tamen konfirmis, ke la hapaksoj de Pich ne havas lokon en nia lingvo. Kiuj subtenas PIVon kiel chefan leksikografian referencon? Supozeble ghia chefrevizianto, ak. Duc Goninaz (jhus elektita prezidanto de Franca Esperanto-Instituto) kaj liaj kunlaborantoj, precipe el Francio.

Chiu akademianoj devus defendi la Fundamenton, sed iuj konsideras sin pli ortodoksaj ol aliaj... (el "Heroldo de Esperanto", n-ro 2061, 7 oktobro 2004; subkribis Funda Mentoro) * [Raumisman vidpunkton supozeble havas almenau la tri akademianoj kun esperanta civitaneco]

LA PLEJ RICHA LITERATURA PREMIO EN ESPERANTIO

Premio "La Verko de la Jaro" de LF-koop, kunlabore kun Esperanta PEN-Centro, farighis la plej richa literatura konkurso en la tuta historio de Esperantio. Ekde 2005 fakte, la aŭtoro de la premiita verko rajtos je senpaga restado (tranoktoj, manghoj, asekuroj) en bela kastelo, disponigita de svisa fondumo apud la Lemana lago. La restado daŭras maksimume ses monatojn, kaj la verkisto engaghos sin okupi tiun tempon per verkado kaj ripozo. La fondumo deziras ke alia instanco prizorgu eventualajn burokratajn demarshojn, kaj tiurilate konsentus se tion farus la Esperanta PEN mem. Chi-lasta farus tion rekte por la propraj membroj. Por aliaj gastoj ghi prefere konfidus la taskon al la Esperanta Civito, kadre de la avantaĝoj donitaj de la Pakto.

KURAGHA STARPUNKTO DE HENRI MASSON

Chu etan krizon de identeco vekis en SAT-Amikaro la informo, ke la unua efektiva esperantisto elektita al la EU-Parlamento, s-ino Malgorzata Handzlik, estas dekstrulino? Tiel komentarias la konata SAT-kolumnisto Henri Masson, en la oktobra "La Sago":

"Bedaurinde la maldekstrularo estas tiel 'progresema' kaj 'avangarda', ke ghi atentos pri esperanto nur kiam la dekstrularo atentos pri ghi, kiam oni uzos ghin en komerco, turismo kaj ankau aliaj senpolitikaj sferoj de la socia vivo."

Ni ne faru el esperanto lingvon de la maldekstrularo." daurigas Henri Masson. "Tiam almenau duono de la homaro havos (chu malpravon?) kialon por rifuzi ghin. Tio ne pli sukcesos ol kiam Stalin volis fari de la rusa la lingvon de la komunismo. Male, ni ghoju ke esperanto progresas ie ajn, kiam ie ajn oni sugestas ghin pritrakti serioze -- ankau en la esperanto-medioj!"

"Pro tio estas preferende ke E-istoj, ech maldekstremaj, estu informitaj pri tiuj antauecaj. Eo progresos nur kiam samgrade progresos la maldekstra kruro kaj la dekstra."

Aludante al la politika panoramo en Francio, Henri Masson daurigas per kuragha kritiko: "Observado de niaj provoj dum jardekoj en maldekstraj medioj montris ke la plej achaj misprezentoj de Eo, perfiduloj kontrau ghi agu simpla rifuzo venis de la dekstrularo (escepte de ministro Ailagon plej lastatempe), ech ne de la ekstremdekstrularo, sed ne malofte de maldekstruloj, i.a. Lionel Jospin, Jack Long, Edith Chresson, Elisabeth Guigou, Catherine Lalumière, Arlette Laguiller, Olivier Besancenot... Sindikatoj escepte de CNT, fajfas pri esperanto."

Kiel Blanka senatanino de la Esperanta Civito mi aplaudas lian konkludon: "Pri la elekto de Malgorzata Handzlik ni ne malghoju pro la mensa fermiteco de la maldekstrularo, kaj eble ankau pro nia nekapablo trovi la shlosilon kiu malfermos ilian menson al la ideo pri egalrajteco en la lingva komunikado."

La objektiviteco de Henri Masson kontrastas kun la pozicio esprimata de Renato Corsetti en lastatempa intervjuo al "Ghangalo". Lau la prezidanto de UEA, "dum la politika dekstro/centro (vastasence) restos la plejmulta forto en la EU-Parlamento, estas malvershajne, ke ni atingos ion seriozan favore al esperanto."

Ni trafas do strangan intershanghon de roloj: dum en SAT-medio oni komencas mediti pri la mistaksoj truditaj de ideologia tradicio, la prezidanto de la plej grava neutrala E-asocio insistas, ke ekster la maldekstro chio estus politike malbona, ech se demokratia -- ech se parto de la dekstro/centro estas pli demokratia ol parto de la maldekstro mem.

Dum iu komprenas ke necesas "masoni" ankau dekstre, alia plu enfermas la realon per antaueca "korseto"...

Vershajne ambau kruroj (dekstra kaj maldekstra) bezonas alian organismon por marshi: lau mi, tia organismo estas nur la Esperanta Civito.

Anna Lászay,
membro de la Blanka grupo
en la Civita Senato

LA UNUA ESPERANTO-TASKO EN LA "INSTITUT ZAMENHOF"

Mi staris che la enirejo de la "Institut Zamenhof", kiam lernantino de la tria klaso de la duagrada nivelo eliris el la lernejo. Shi venis ghis mi kaj subite mi audis: "Saluton". Mi turnighis, kaj jen iu, pri kies Esperantisteco mi scias nenion. Mi tamen respondis: "Saluton ! Kiel vi fartas, chu bone". Shi plureagis: "Mi fartas bone". Mi konfuzighis agrable, kaj aldonis pliajn vortojn Esperante:

- Kiu vi estas?
- Mi estas Sandra.
- Chu vi lernas Esperanton ?
- Jes.
- Kiu estas via instruisto ?

Jen shi ne povis respondi tiun chi lastan demandon, char shi tute ne komprenas. Tiam eliris aliaj gelernantoj el la instituto, kaj chiu bone diris "saluton". Mi devis tiam kompreni, ke jhus okazis tasko esperanta, kaj ties enhavon tiel utiligis jam la lernantino. Mi eniris la lernejon, kaj alproskimighis al lernanto de la unua klaso de la duagrada nivelo.

- Kiu vi estas ?
- Mi estas Justin.
- Kio vi estas ?
- Mi estas lernanto.

Chirkaue, aliaj gelernantoj flustris "Saluton". Mia forgesemo igas min ne memori ion. Tiu tago estis la 18-a de novembro, tiam la instruado de Esperanto en la instituto jam aghas du semajnojn.

La 2-an de novembro s-ro Kanlipou Koami Daniel komencis la instruadon de Esperanto en la "Institut Zamenhof". Tio chi estas unu el la rekomendoj de la asocio de la gepatroj de la gelernantoj. Esperanto estas do unu el le nedeviga lernobjekto en la instituto. Chiu klaso havas almenau unu studhoron en la semajno. La lernolibroj "Okulo" estas uzata por la gelernantoj de la unua klaso, Zagreba Metodo por la dua klaso kaj Metodo 11 por la tria klaso. Ghis la fino de la jaro la unua klaso atingos la Zagreban Metodon, la dua, la Metodon 11, kaj la tria, la Metodon 12. Jen la komenco de la instruado de Esperanto en la "Institut Zamenhof". Parelele okazas ankaŭ kurso al instruistoj ne tute au tute ne esperantistoj. Aliaj okazos por gepatroj de gelernantoj. Dispongi Esperantajhojn al la gelernantoj ege kuraghigos ilin. Donacemuloj uzu jenan adreson:

"Institut Zamenhof"

11 B.P. 48

Lome 11

TOGO

Kiuj volas havi pli da informoj, tiuj rilatu kun mi.

GBEGLO Koffi

Informoj de AVE

Karaj geamikoj,
el la lavango da novajxoj mi elektis tiujn por sendi al vi.
Sur nia TTT-ejo trovigxas ankaŭ aliaj (por via informo). Bondezirojn, Amike, Manfred

AVENO 2004-11-26

Gratulon kaj Bondezirojn al la manifestaciantoj en Ukrainio !

Malgraux frosto ili postulas novan baloton por la prezidento; cxar evidente okazis frauxdo.

Pro malsekura elekto-regulato vocxdonantoj povis "karuseli" kaj tiel aldonigxis al unu kandidato versxajne pli ol miliono da duoblaj/pluroblaj vocxoj. Pro tio tute ne suficxas rekalkuli la vocxojn.

Denove la rusa prezidento Putin montris lian komprenon de "demokratio"; cxar li forte enmiksigxis en la eksterlandan balotokampanjon.

Krome:

- Informoj pri GMO kaj atom-reaktora tipo kiu uzas ne-enricxigitan Uranon.

- Plumba arseniato estas uzata en Urugvajo (kaj ??) por ke iuj insektoj ne mangxu la foliojn. Bedauxrinde poste la plumbo trovigxas en la trinkakvo kaj malsanigas la homojn. (De Sandra Burgues)

- Moldavio plendas kontraux Transnistrio, najbaro en la direkto al Ukrainio.

Pro pluraj kauxzoj:

1. Multaj homoj tie parolas la rumanan lingvon - sed estas malhelpataj lerni gxin.
2. Kvankam Transnistrio ne apartenas al Rusio, tie ankoraux trovigxas granda arsenalo da armiloj de Rusio. Kaj multaj Rusoj zorgas pri gxi.
3. La sxtato Transnistrio ne estas oficiale agnoskata.
4. Gxia kvazauxa registaro subtenas mafion kaj nigran merkaton: ekz-e kontrauxbandado de narkotikajxoj kaj homoj. (2004-11-26, antaux 7:00 horo ; Informo de Deutschlandfunk (germana radio-stacio)); www.deutschlandradio.de

----- fino ---

Verduloj Esperantistaj (2004-11-28): www.comlink.org.apc/ave/

Informilo de Ghemelaj Urboj

Estimataj,

Post la Pekina UK mi tuj komencis redakti N-ron.3(10) Informilo de Ghemelaj Urboj, sed bedauxrinde char mia komputilo estis en nebona funkciigo, finfine perdis kelkaj gravaj dokumentoj, inkluzive de la jhus finredaktita n-ro.3(10)"Kongresa Numero". Chi numero, kiun vi legos, estas la dua redakto. Mi petas pardonon de vi pro tio, ke chi numero tre malfruas. Informu min pri tio se vi ne shatas kaj ne plu volas ricevi la retan revueton "Informilo de Ghemelaj Urboj". Ajna propono aux ideo pri la disvolvo de la projekto"Ghemelaj Urboj" chiam estas bona.

Kore salutas vin.

Wu Guojiang

Renovig'o de Balkana Komisiono

Antau' ne longe s-ino Aurora Bute petmesag'is al mi rilate la reanig'on al Balkana Komisiono por la jaro 2005. Mi respondis jese. Jen s'ia reago:

Koran dankon pro la konfirmo. Jes, mi sufiche bone fartas, kaj strebas agadi por la balkana komisiono, krom la landa E-agado, kiu tute ne estas facila. Mi certas ke en preskau chiuj balkanaj landoj estas malfacilajhoj, kiujn ni devas alfronti. Kiel ajn, Esperanto meritas nian penon. Esperante je via kunlaboro, amike salutas vin, Aurora Bute

Bardhyl Selimi

Ismail Kadare-intervjuo

Albanoj ne distingas inter Usono kaj Eu'ropa Unio

Antau' ne longe, la eminenta albana verkisto Ismail Kadare, plurfoje proponita por la beletra Nobel-premio, intervjuig'is de radiostacio "La Voc'o de Ameriko" albanalingve. Demandite pri tio, ke en Balkanio dau're okazas sangumaj interretnaj kaj interreligiaj konfliktoj oni petis lian opinion pri la estonto de nia relative maltrankvila Duoninsulo.

Ismail kadare respondis: Mi kredas je tio ke Balkanio malrapide sed certe transformig'os en pacan kaj prosperan regionon. Li dau'rigis dirante ke por vivi demokratece kaj emancipite, liberale, kiel diri, homece, ne nepras rezigni de propra nacia identeco. Ne eblas fondi unusolan popolon enmonde, tion ne elteneblas la homaro; ne eblas fondi lingvon unusolan, tion ne toleras la homaro; ne eblas fondi unusolan kulturon, ne enteneblas tion nia planedo. La mondo estas arang'ita lau' certa ekvilibro, kie estas disigitaj la kulturoj, popoloj, lingvoj kaj ili devas interkonsentig'i homece, harmonie. Ne povas esti solvo la nuligo de diferencoj, por ke ni pli bone komprenu unu la alian. Tio estus tragika miskompreno. Ne povas okazi malapero de identecoj, tio nenion bonan alportus. La mondo ne povas funkcii kiel grandegan, senfinan etnegon. Ne eblas, tio iras kontrau' la naturon, kontrau' la manieron de ties naskig'o. Tial oni ne devas postuli tion. Tio estus ne nur naiva sed ec' maltau'ga demando, t.e. ke ni nuligu la identecon por ke ni farig'u modernaj. Tio alportus alian katastrofon, post kiu oni ekserc'us centojn da aliaj artefaritaj identecoj.

Demandite pri tio kial en la orienteu'ropaj kaj centroeu'ropaj landoj oni konstatas ian forgeson de la historia memoro, ian cinismon al antau'a komunisma periodo, Ismail Kadare sin prononcis:

Mi timas ke oni miksas c'i tie ian snobismon. Popolo nature ne povas vivi kun la pasinteco, ec' pli la novaj generacioj, sed forgesi la pasintecon ne estas normale. Iamfoje oni konsideras tion moderneca. Sed g'i tute ne estas tia: neniu forgesas tion kio okazis al li dumvive, des pli la tuta popolo ne povas forgesi. Mi timas ke tion faras homoj kiuj sin s'ajnigas ke ili vivas kun la estonto kc kc, estas ja ia klis'eo. Vi ne povas do vivi kun la futuro normale, se la pasinteco transformig'as c'e vi en nebulon kaj vi ne komprenas kio okazas do. Neniel! La homa naturo, la homa vivo disponas pri tri dimensioj: la prezento, la preterito kaj la futuro, tiel estis kaj tiel pluestos. Ne povas s'ang'ig'i la homa naturo tiudirekten.

Demandite pri la rolo kaj pozicio de intelektuloj en tiuj landoj aktuale, c'u vere ili ne tre aktivis kaj kontribuas en siaj landoj, la albana konata verkisto diris:

En niaj landoj bedau'rinde estas ankoraŭ tro da krueleco kaj ignoreco, tial en tia etoso, klimato, estas tro da brutaleco, la intelektularo hezitemas. Ne pro timo, sed pro ofendo fare de tia krueleco. Ne ekzistas normala radikala diskuto. C'u vi jam rimarkis la diskutojn en Albanio? Ili estas tro kruelaj kaj en si mem forigas ian ajn dezirojn de intelektuloj por ilin partopreni. Do, unu rezono estas c'i tiu: la krueleco de klimato, etoso. La intelektula diskuto, la liberala diskuto postulas normalan klimaton.

Kial Balkano postrestis kiel ia nigra truo en Eu'ropo kiam aliaj regionoj strebas alig'i al EU? C'u tion influas la naciismaj sentoj, la psikologio de la popoloj de Balkanio?

Mi ne konsentas je tia opinio, tute malkredebla kaj negativa pri Balkanio. Tia klis'eo jam ekzistas en Eu'ropo, estas disvastigita c'ie, dau'ras ekde jarcento. Mi opinias ke tio estas malg'usta, malprofunda, facilanima kaj entenas en si ian koloniisman mensecon ne malferman, sed kas'itan. Balkanio estas ja regiono de la mondo, kun c'iuaj siaj bonoj kaj malbonoj, kun c'iuaj siaj maltaŭgoj. Ne estas ja la ceteraj regionoj de la mondo, ec' de Eu'ropo, tiel pli bonaj rilate Balkanion, c'ar en ili, kiel sciite, okazis tiom da teruraj'oj kiuj ne povas forgesati dum miljaroj, tial ne eblas ke Balkanio portu pli ol g'i povas porti sur sia dorson, en tiu eu'ropa historio. Bedau'rinde, la popoloj de Balkanio estas tro furoraj en sia malbono kaj kiam ili sukcesos estis iom furoraj en sia bono, mi opinias ke tiamtempe, komencig'os por ili nova erao, nova tempo. C'i lastaj ne estas ja beletaj frazoj kiujn oni povas eldiri kiel poeziaj, sed mi persone konas tre bone balkanianojn, kaj ili envere disponas pri granda nobleca rezervo en sia naturo, kiu malbons'ance estas jam kovrita g'is nun per ilia malbono, de ilia malsag'eco, de iliaj jam faritaj maltaŭgaj'oj, de tiuj febroj ilin kaptantaj de fojo al fojo, el kiuj ili ne scipovas eliri. Tamen tiu rezervo de nobleco estas ja c'e ili, kaj plurestos vers'ajne longan tempon por ke aperu estonte. Bedau'rinde g'i malfruig'os sed certe aperos.

Kion vi opinias pri la kontraŭ'usonisma sinteno de francoj g'enerale? C'u tio veras?

Bedau'rinde tio estas vera. Mi jam prononcig'is en grandajn francajn j'urnalojn rilate tion. Mi deklaris eksplicite ke tio malutilos al mem francoj. Kvankam miaj ligoj estas kun Francio multe pli ol kun Usono, mi rediras ke Francio eraras ege tolerante tian kontraŭ'usonon epidemion. Tio estas kontraŭ' logiko, eksteretika, ekster la intereso de mem Francio. Francio kaj Usono envere ne havas seriozajn profundajn disig'ojn, sed nur malprofundajn, bedau'rinde pasiaecajn. Aliflanke oni devas klarigi ke en Francio ekzistas tre forta homgrupo de verkistoj, intelektuloj, filozofoj kiuj ne apogas tian sintenon kontraŭ'usona. Estas ja je honoro de francoj kiuj au'das ties opiniojn, kvankam ili mem g'enerale, estas kontraŭ'usonaj.

Kiel vi eksplikas la sintenon de la landoj de orienta kaj centra Eu'ropo al Usono kaj EU? Kvankam ili strebas al EU, ili do apogas Usonon?

La intereso de tiuj landoj estis ligita kun Eu'ropo kaj tamen ili subtenas Usonon. Tio montras unue honestecon flanke de ili, tre altan integrecon; due tre profundan sag'econ. Tio estas ke tiuj s'tatoj (al kiuj apartenas ankau' Albanio) montris tre altan moralecon, ke malgrau' iliaj intereso, atendante c'e la pordoj de EU, envice, ili sintenis tre principe, eksterordinare moralece. Tio eksplicitas ankau' per alia rezono. Ili ne plu povas elteni la kontraŭ'usonon propagandon kiun ili au'dis plurajn jardekojn, danke al regintaj ekskomunistaj partioj. Ni ja scias pli bone ol kelkiu alia ke la klasika kontraŭ'usonismo

estas filtrita stalinismo. Stalinismo estas survivinta jardekojn nutrig'ante per kontrau'usonismo. Nature, por ni tio estas malbona song'o: au'skulti la samajn sloganojn ripetitaj hodiau' en la okcidentaj landoj.

Tiujn, kiujn ni konsideris terruraj'oj dum la jaroj de komunismo, ekde mateno g'is vespere. Radio kaj preso parolis kontrau' Usonon. Do, al tiuj popoloj vers'ajne, tio estas malferminta la okulojn, igis ilin pli klaraj. Kaj ilia vizio, inkluzive ankau' albanan vizion, vidas al Okcidento unu solan mondon, unuig'intan, ne disig'endan, havanta eble kontrau'dirojn sed neniel disigeblan. Tia vizio estas pli sana kaj pli sag'a ol c'iu alia vizio. Tia vizio estas unu el aferoj pri kiuj ni povas fieri.

Enalbanigis Bardhyl Selimi

El la diplomlaboraj'oj de niaj studentoj

Fragmento el la diplomlaboraj'o de Elton Zaimi

3.1.1.4. Kelkaj apartecoj de Shkoder dum jarcentoj¹

En la jaro 1912 Shkoder estis ja plej granda urbo de Albanio, kun log'antaro c'irkau' 36 mil homoj kaj grava ekonomia, militista kaj kultura nodo de balkanio. G'i havsi apartan pasintecon; ekde XIII-XIV jarcentoj la urbo havis komercajn rilatojn kun Raguza , same kun Ancona , Trieste ka. Unuagrada tranzita centro en Balkanio, Shkoder ludis gravan rolon por la ligoj de Adriatika Maro kun Kosovo, Montenegro kaj interne de la hinterlando. Por Shkoder laboris la marhavenoj de Tivar, Ulqin, Obot kaj Shengjin. Kelcentunaj boatoj navigadis sur Buna g'is Oboto. Nur la marhaveno de Ulqin ekde XVII jarcento posedis 800 boatojn kaj lau' graveco estis la tria marhaveno de Adriatiko, post Venecio kaj Dubrovniko.

3.1.1. Kastelo de Rozafa

Sur la fono de la urbo Shkoder, sur roka monteto, je 130 m super la marnivelo, kudrita kvazau per feraj ungegoj al la krutig'intaj s'tonegoj, c'irkau'ata de la riveroj Buna, Drin kaj Kiri, starig'as majesta la konata kastelo per la toponimo "Rozafa".

La monteto de la kastelo konsistigas la s'losilon de la tuta areo. Neniu alia punkto, akcentas la germana au'toro Johan van Han, estis pli tau'ga por ties konstruig'o kaj antau'uloj tion ja scii bone. La kastelo kunfrontig'ante la s'tormojn de historio kaj miljarojn, estas konservinte la spurojn de pratempo kaj mezepoko, por ke ilin havu vivaj atestaj'oj de fora heredaj'o rilatig'anta kun la radikoj de tiu c'i urbo.

La legendo

Oni diras ke estis ja tri fratoj entreprenintaj la iniciaton starigi la kastelon. Ili laboris tutan tagon sed c'io ruinig'is dumnokte. Maltrankviligitaj, la fratoj decidis oferi unu el iliaj edzinoj venontan tagon , g'uste tiun kiu alportus ilin mang'aj'on. La destino trafis la

¹ Përparim Rexhepi, "Mbrojtja e Shkodrës", Tiranë 2001

edzinon de la plej maljuna frato por ke s'i enmurig'u. La fideleco de la malgranda frato kaj la sinofero de juna novedzino en la legendo ricevas apartan simbolecon kaj lumon. La novedzino sinoferonta estis jam patrino: s'i ne kontrau'staris, sed petis ke oni lasu al s'i nekovrite la dekstran mamon, por ke s'i povu mamnutri sian bebon; la dekstran manon por ke s'i povu karesi g'in kaj la dekstran piedon por ke s'i povu luli la lulilon. La majestecon de tiu c'i sublimes momento eternig'as ankau' la kanzono alveninta g'is hodiau'a tempo. Tiu kanzono enhavas antaŭhistorian mensecon de honesta homo. Tie c'eestas la memakceptita sinofero, ankau' la Beso (donita parolo), rezistemo..Por la granda franca poeto Lamartin la sinofero de virino komparatas nur kun la sinofero de Ifigenio por Agamemnono.

La donitaj'oj de arkeologio

Kvankam ankoraŭ ne estas realigitaj propraj arkeologiaj elfosadoj sur tiu loko, la tekniko kaj ekzisto de diversaj periodoj montras ke la kastelo estas unu el la pratempaj log'lokoj de la baseno de Shkoder, log'ata ekde la periodo de frua bronzo, c'irkau' 4000 jaroj antaŭe. La vizitanto povas konatig'i kun monumentoj kaj multaj objektoj apartenantaj al la diversaj historiaj periodoj.

Sur la fundamentoj de la kastelo enradikig'as la pratempa kaj ric'a kulturo de la urbo. Tie naskig'as la unuaj elementoj de la urbana vivo en la baseno de Shkoder. La romia historiisto Tit Livi alportas atestaj'ojn pri potenca antikva urbo bone protektata. El la fortifikitaj muroj hodiau' konservig'as nur du murtraktoj antikvaj c'e la enirejo de la kastelo. La konstruado de tiu fortifikita muro estas realigita per grandaj s'tonoj je seka ligiteco, lau' la konstruaj principoj de la modernaj urbanaj pordefendaj konstruoj .

En tiu periodo estas fortifikita nur la supra parto de la urbo, akropolo, la muroj estas c'irkau'intaj la surfacon de la monteto, pli malpli lau' tiu linio , kiun poste sekvis la fortifikita mezepoka sistemo.

La kastelo konservas la spurojn de la klasika periodo de Mezepoko g'is la lasta jarcento sed sian fundamentan formon g'i ricevis ekde la dua duono de XIV jarcento (periodo de regado de Balshaj), por ke atingu en pli kompleta formo per la veneciaj kontraŭaj'oj dum la jaroj 1407, 1416, 1468 kaj pli poste per tiuj turkaj. La mezepokaj muroj, starigitaj sur la ilirajn konstruaj'ojn, konstruita per s'tonoj ligitaj per kalka mortero, sekvas la regulan linion de la surfaco, je formo de elipso je perimetro 881 m, ampleksanta surfacon je 4 ha kaj plifortikig'inta per kelkaj defendturoj je formo kaj dimensioj ne samaj, konstruitaj en diversaj tempoj.

Kiu ajn surprizig'as antaŭ tiuj muroj, antaŭ la majstreco kaj fantazio de la homoj ilin konstruintaj samkiel antaŭ la altecoj sur kiun ili estas starig'intaj. Tie c'i la loka tradicio , sendepende de influoj, aperas potenca.

La kastelo reprezentas klarajn elementojn de la tempo, sed g'ian plejparton difinas la mezepokaj muroj starigitaj sur la ilirajn murojn. C'iuuj priskribas sammaniere tiun c'i fortifikitan verkaj'on, c'u Hekard, Ippen, Jirek, S'uflaj: ununura enirejo, certigita per tri pordegoj, sinsekvaj. Inter ili estas tri kortoj kaj fortifikitaj koridoroj, c'iu kun aparta propra fizionomio. Krom la c'efan enirejon, g'i havas ankau' kelkaj malgrandaj enirejoj, duarangaj, servantaj por manovrado de fortoj au' kiel sekretajn elirejojn. En la gravaj

mezepokaj urboj, kiel Shkoder, kie la atako kontraŭ la enirejon estig'is per multnombraj fortoj, antaŭ ili oni konstruis fortifikitajn kortojn, barbakanojn. La barbakano de la kastelo estas konstruita de venecianoj dum la jaroj 1406-1407. La defendsystemo de la c'efa enirejo komandig'is de ora donj'ono (c'efturo) je formo multangula, konstruita de venecianoj en la jaro 1468.

La dua korto havas surfacon pli grandan kaj pli protektatan. Tie troviĝas domoj de kulto, pluvakvrezervejoj, magazenoj, domoj de gardistaro ks. Ene de la muroj de la kastelo konservig'as 5 pluvakvrezervejoj (sarang'a), konstruitaj post la jaro 1397. La pluvakvrezervejoj kolektis la akvon kaj arigis g'in pere de multnombraj tuboj tra irantaj tiujn c'iajn kortojn kie ajn.

La katedralo de Sankta Stefano estas konstruita je la fino de XIII jarcento. G'ia konstruado pasis tri c'efajn fazojn. En la tria fazo, post la turka okupacio, g'ia transformig'as al moskeo.

La kastelo de Shkoder estis la plej protektata kaj plej potenca por kunfrontig'i al la longaj bataloj kaj sieĝoj. G'ia staris inter la kastelo de Lezha, de Danja kaj de Drisht. Sur la pratempaj kreneloj, sur la grandaj defendturoj, sur fortifikitaj muroj elbatitaj de kanonoj, s'kodranoj estas skribintaj per sango tiun militeman historion kiu estas samtempe ankaŭ la historio de tiu c'ia kastelo.

La kastelo "Rozafa" estis malvaste ligita kun la naskiĝo kaj evoluo de la urbo de Shkoder. Samtempe g'ia staris kiel potenca gardistaro de la urbo mem. Tie okazis la iliro-romiaj militoj, en la jaro 168 antaŭ Kristo. Dum Mezepoko g'ia estis okupita foje de Bizanco, foje de slavoj, g'is la jaro 1395, kiam g'in ekposedis Balshaj, princlando de lokaj grandbienuloj, kiuj tenis g'in g'is la jaro 1396, kiam estis devigitaj enmanigi al Venecio. La kastelo estas travivinta du potencajn sieĝojn fare de la osmanaj armeoj, en la jaro 1474 kaj en la jaro 1478-1479. Tiu "c'effortreso de la tuta lando: kiel prave g'in nomis samtempa venecia historiisto, montris ke g'ia ne povis subig'i kiel ajn. Parolante pri la rezistado de la s'kofranaj bravuloj, mem la turka kronikisto, Kemal Pashazade, estis devigite akcepti ke "kvankam ni ege klopodis, tamen ni ne sukcesis ilin eligi el iliaj pozicioj, c'ar ili estis homoj kun akraj ungegoj, kaj korpo el bronzo, starintaj sur la defendturoj kaj muroj de la kastelo. Ili estis tigroj sur la montopintoj"

En la jaro 1479 la urbo definitive enfalis en la manojn de osmanaj turkoj. Ankaŭ poste la kastelo estas ludinta defendan rolon por la urbo. G'is la jaro 1865 g'ia estas konservinta g'iajn funkciojn administrajn kaj militistajn. Post tiu periodo g'ia havis gravecon nur je vidpunkto militista.

En la jaro 1914 sur la kastelo starig'as la blazono de Albanio.

La maljuna kastelo, domag'ita, duonigita pro senfinaj sieĝoj, rememorigas hodiaŭ la militon, la morton, la gloron.

La miljara kastelo estas subigita al restau'rado. En unu el ties ejoj, en tiu de kapitanejo (domo el XV jarcento), estas starig'inta g'ia muzeo. La pli malnovaj atestaj'oj spegulitaj en tiu c'ia muzeo parolas pri pratempa ekzisto de tiu kastelo. La arkeologiaj, historiaj objektoj, la dokumentoj de pratempaj historiistoj: Plibi, Tit Livi samkiel sufiĉe multe da armiloj, artaj'oj de lokaj kaj fremdaj aŭtoroj, atestas pri senc'esaj militoj kontraŭ romianojn, bizancanojn, slavojn, turkojn, pri la rezisteco de s'kodranoj kaj pri plifortig'o de la lokaj grandbienuloj, Balshaj kaj Bushatlioj. En tiu c'ia muzeo la vizitanto

trovas tre gravajn momentojn de historio de transviveco de la albana popolo de tiu regiono.

Hierau' kaj hodiau' la kastelo estis kaj plurestas objekton de inspirigo por verkistoj kaj artistoj fremdaj kaj lokaj, sur kies motivoj ili estas realigintaj dignecajn kaj impresigajn verkaj'ojn, ekde poeziaj'oj, baladoj, komponaj'oj en pentroarto kaj skulptarto g'is la artismaj filmoj.

La kastelo "Rozafa" estas unu el plej okulfrapaj monumentecaj ric'aj'oj en Albanio. G'i estas ja simbolo de kondukig'o de la vivo de generacio al generacio kaj estas elsendinta la grandan historian mesag'on de la rezisteco kaj sakrifiko por tiuj teroj. Tradicie g'i estis unu el la plej frekventataj monumentoj fare de enlandanoj kaj fremduloj.

Tra la kastelo ni alpas'os tiel kiel estas alpas'inte ankau' antau'e generacioj, turistoj, kronikistoj, diversaj scivolemuloj, kaj rakontos kaj travivos memoraj'ojn el tiu majesta monumento alportanta dankemon kaj respekton al la historia pasinteco.

3.1.2.2. Du fazoj de la evolua de la urbo

Estas rimarkite du fazoj en la evoluig'o de la urbo: Kiam Shkoder kiel mezepokan urbon etendig'is c'irkau' la monteto kaj kastelo, sub la protekton de tiu lasta kaj kiam pro sanigaj kialoj, por evidti la sinsekvajn inundojn kaj diluvojn g'i transpasi pli foren de la lago kaj la kastelo.

La pli grandan disvolvig'on la urbo akiris en XVIII jc kaj aparte en XIV jc. G'is malfrue plurestis domoj kiuj portis gravurita surs'tone ec' la jaron de ilia finkonstruig'o. Ekzemple la domo de Bep Muzhani el la jaro 1736.

Je unu flanko ni vidas la domojn situantaj unu apud la alia, kvazau' ili volas sin protekti, per pordoj kaj paffenestroj, altaj c'irkau'igaj muroj, mallarg'aj stratetoj, serpentumaj, ofte senelirejaj stratetoj.

La hodiau'a Shkoder estis malfiksita el la malnovaj grundoj c'irkau' la kastelo antau' du jarcentoj.

En la jaro 1865 ankau' la administrantaro forlasis la kastelon kaj establig'is en la urbo. Do, la popola log'ejo en Shkoder estas ne pli maljuna ol la mezo de XIII jc. G'is la mezo de XIX jarcento, oni konstruis la log'ejon kun teraseto je ties subvariecoj. C'at tiuj log'ejoj devus plenumi ankau' aliajn funkciojn krom la log'ado, ili akiris pliajn aspektojn.